

# juna amiko

novembro 2020 • n-ro 4/2020 (165) ←



PROGRESIGA REVUO  
POR LEGANTOJ  
INTER 10- KAJ  
100-JARAĜAJ


△ Buĥaro, unu el la plej gravaj urboj de Uzbekio.  
*Konversaciaj temoj:* Datreveno kun torto. *Elstaraj virinoj:* Nigruloj en la franca arto. *Lude:* Ankaŭ al nia nesto (re)venos iam la festo. La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. *Domeno:* ĉu ludo aŭ matematiko?

# Ludu

Aŭtorino: Sonmy Álvarez  
Tradukisto: José de Jesús Campos




**1** Kiom da rektanguloj oni povas rigardi en tiu tapiŝo?



**2** Kiom da objektoj la infano desegnis?

En tiu desegno estas eraro. Divenu ĝin.

**3**



Respondoj: 1 – estas 16 rektanguloj; 2 – kraĵono, kuseno, tenilsegilo, floro, ujo kaj pomo; 3 – la ombroj de la infano kaj de la hundo devas esti antaŭ ili.



# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) ... 4

## Konversaciaj temoj:

Datreveno kun torto (Judit Felszeghy, HU) ..... 5



**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 10

Micaela Fahrni, horloĝfaristino (Mireille Grosjean, CH) ..... 11



**Legendoj:** Nasr Edin Hoĝa: Ĉirkaŭ li ĉio abundas (Mireille Grosjean, CH) ..... 12



**Kantu kun Juna Amiko:** En la nokto de Kristnasko (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 13

**Elstaraj virinoj: Nigruloj en la franca arto** (Renée Triolle, FR) ..... 14



**LUDE, la unika dua etaĝo:** Ankaŭ al nia nesto (re)venos iam la festo (Mónika Molnár, CH) ..... 17

**Festivaloj:** La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj kantoj (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 19



**Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj**  
Europejski Festiwal Piosenki Esperancjki

**Recenzo:** Inter iluzio kaj realo – komentoj pri *La mirinda sorĉiso de Oz* (Luiza Carol, IL) ..... 20



**Legu librojn – premioj – konkursoj:**

Club de bona libro. Ek-konu mian landon pere de ĝia legendo. (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 22



**Kian stultan ideon mi havis...** (Mireille Grosjean, CH) ..... 28

**Poezio:** De la 13-a jarcento en Ŝirazo, al la nuna tempo ĉe UN en Novjorko – Sadio (Renato Corsetti, IT) ..... 29



Kvar legendoj (Jozefo de J. Campos Pacheco, CU) ..... 30

**Signolingvoj:** Gestlingvo(j). (Renée Triolle, FR) ..... 33

**Ludo:** Domeno: ĉu ludo aŭ matematiko? (Renée Triolle, FR) ..... 34

Legu kaj ordigu: (Mireille Grosjean, CH); Ruĝa lumo, verda lumo (Lode Van de Velde, BE) ..... 35

**Libroj:** Mi estas kato (Sooseki Natsume, JP) ... 36



**LASTE, la tria etaĝo:** Instruistoj revas pri Edinburgo kaj Skotlando (Stefan MacGill, NZ/HU) ..... 38

**Eldonanto** de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). **Jura sidejo**: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo**: [ilei.mondo.info](http://ilei.mondo.info). Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 154 (1972 ĝis 2018) publike legeblas ĉe: [www.eventoj.hu/juna-amiko/](http://www.eventoj.hu/juna-amiko/). Vidu ankaŭ [lernu.net](http://lernu.net) kaj [edukado.net](http://edukado.net).

**Redaktoro**: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio) kaj Utho Maier (Germanio). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto**: Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto**: Sebastian Cyprych, [ilei.oficejo@gmail.com](mailto:ilei.oficejo@gmail.com). **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en februaro 2021. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en t.n. A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekz. al la sama adreso). Reta varianto: A-lande €11, B-lande €7.

ISSN 0230 1318

## Karaj amikoj!

**B**onvenon ĉe la lasta numero de *Juna Amiko* en la jaro 2020, kiu bedaŭrinde ne estis tre amika por ni. La koronavirusa pandemio daŭras, kaj ni kune serĉu vojojn, kiel utile kaj ĝojige pasigi la tempon en nia “izoliĝo”. Tamen – la proverbo “en ĉiu malbono estas iom da bono” verŝajne iom pravas.

Kun *Juna Amiko* vi denove povos amuziĝi (bildstrioj sur la dua paĝo kaj sur la dorso, la rubriko LUDE), konatiĝi kun la ludo Domeno, kolorigi bildojn kaj serĉi diferencojn (LUME), kanti hungaran kristnaskan kanton aŭ la francan “Ruĝa lumo, verda lumo”, ĉeesti Festivalon de Esperantaj Kantoj en Pollando, baki ĉokoladan torton “Nigra Arbaro” por familia festo, ekkoni svisan horloĝistinon kun aglaj okuloj kaj feinaj fingroj...

Cetere – ĉu vi jam aŭdis aŭ legis pri la turka popola humoristo, islama teologo, instruisto, filozofo, saĝulo/stultulo/idioto kaj aktoro Nasreddin, Goha, Joha...

– kaj lia azeno? En la numero estas kelkaj rakontoj kaj legendoj pri li.

Denove eblas legi poemojn, recenzojn, ĉapitron el japana libro, legendojn, konatiĝi kun signo-lingvoj... Kun pliaj *elstaraj virinoj* en la franca arto, ĉi-foje kun iom malpli hela haŭto, vi povos konatiĝi en la kutima samnoma rubriko.

Frontpaĝo de la numero montras templon en unu el plej grandaj urboj de Uzbekio, Buĥaro, ilustraĵo por la rubriko *Legu kaj Ĝuu*, kiu ebligas al vi konatiĝi kun tiu admirinda lando en Centra Azio, legi ĝiajn legendojn kaj fari la konkursajn taskojn.

Ĉu ankaŭ vi havas iam stultajn ideojn? Konatiĝu kun unu plia de la prezidantino de ILEI.

Proksimiĝas la jarfinaj kaj novjaraj festoj kun belaj tradicioj, solenaj manĝaĵoj kaj belaj kantoj. Kelkaj estas priskribitaj kaj desegnitaj en la tradiciaj rubrikoj *LUDE* kaj *Kantu kun Juna Amiko*. En la rubriko *Laste* ni ekscios, kie kaj kiel kongresos nia ILEI en 2021. Agrablan legadon kaj belajn jarŝanĝajn festotagojn!

**Stano Marĉek**

## Karaj legantoj!

**V**i malkovras hodiaŭ novan numeron de via revuo *Juna Amiko*, kiu naskiĝas per kolektado de diversaj brikoj, artikoloj de rubrikestroj kaj kontribuantoj. Do temas pri mozaiko. En tiu ĉi numero tute hazarde aperas diversaj informoj pri okcidenta Azio kaj centra Azio. Nasr Edin Hoĝa devenas de tiu mondoparto, kie situas ankaŭ Uzbekio kaj Irano. Kia hazardo!

Plie aperas du tekstoj en rilato kun Afrikanoj, tute hazarde. Aperas teksto pri la trafiklumoj, la ruĝa kaj la verda. Ankaŭ estas la flava. Tiuj tri koloroj estas la tri tipe afrikaj koloroj. Mi ie legis, ke afrikdevena usonano en la jaro 1920

proksimume inventis la trafiklumojn. Pro sia origino li elektis tiujn tri kolorojn, kiuj nuntempe aperas sur preskaŭ la duono de la afrikaj flagoj. Kaj ĵus nun salutante vin mi sidas en Kotonuo, Benino, kies flagon vi vidas meze de tiu ĉi teksto.

Legante la revuon ni eĉ vojaĝas al Suda Ameriko, Kubo kaj Japanio. Kaj kiel Micaela, la lerta horloĝfaristino, ni saltos al Ĉinio. Do denove per via revuo vi povos vojaĝi kaj akiri sciojn kaj impresojn pri fremdaj landoj, fremdaj kutimoj, fremdaj frandaĵoj, fremdaj lingvoj. Eĉ gestolingvo aperas en tiu ĉi numero.

La ludoj kaj kvizoj ne mankas. Do vi amuziĝos multe. Ni deziras al vi bonan legadon kaj agrablan amuziĝon!

**Mireille Grosjean**, prezidanto de ILEI





# Datreveno kun torto

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

## I. Kion donaci al patrino por ŝia naskiĝ-datreveno?

**Karina (K) babilas kun sia amikino Stela (S) en la hejmo de Stela, en iu vintra posttagmezo.**

K – Mi estas senkonsila! Helpu min!

S – Kiun problemon vi havas?

K – Post dek tagoj mia patrino festos sian datrevenon. Kaj mi ankoraŭ nenion aĉetis por ŝi!

S – Hm... hm... malfacile!

K – Jes! Mi eĉ ideon ne havas! Ĉu vi povus helpi al mi?

S – Certe jes! Ĉiam devas esti iu solvo! Unue ni devas scii, kiom da mono vi havas por la donaco.

K – Tio estas la alia problemo: ne multe da.

S – Do, pulovero, koltuko, parfumo ne konvenas, ĉu?

K – Ne, ne. Krome, ŝi havas sufiĉe

specialan guston: io plaĉas ekzemple al mi, sed tio tute ne plaĉas al ŝi.

S – Do, eble iu libro?

K – Ankaŭ mi jam pensis pri tio. Sed ni havas hejme grandan bibliotekon kaj krome ŝi vizitas ankaŭ la urban bibliotekon. Mi ne scias, kiujn librojn ŝi ankoraŭ ne legis. Rilate kompaktajn diskojn estas tiel same; mi ne volas riski aĉeti por ŝi tiun muzikon, kiun poste ŝi ne aŭskultos.

S – Ho, hm... Eble floron, ĉu?

K – Nuntempe ne indas planti, ĉar estas jam malvarme. Senradikajn florojn ŝi tute ne ŝatas, ĉar ŝi bedaŭras la plantojn fortranĉitajn de la radiko aŭ de la tigo.

S – Se vi aĉetus ion por la kuirejo? Poton aŭ elektran maŝineton?

K – Ho, tute ne, Stela! Panjo ja ofte plendas al Paĉjo, kiam li aĉetas por ŝi utilan donacon, dirante, ke tio tute ne estas persona surprizo, sed io necesa por la tuta familio.





S – Kaj se vi mem preparus por ŝi iun tute personan donaceton?

K – Pri kio vi pensas Stela?

S – Tio povus esti iu foto pri vi, en memfarita kadro. Aŭ iu vazo, kiun vi mem fabrikus el jam neuzata vitra ujo... – aŭ kesteton por ŝiaj kudriloj.

K – Se mi estus iomete lerta, tio povus esti bona ideo! Sed mi estas mallerta. Tiu donaco certe estus fuŝaĵo. Tamen... Stela, vi donis al mi bonegan ideon!

S – Ĉu vere? Kion? Diru jam!

K – Mi bakos por ŝi kukon! La torto de Nigra Arbaro estas ŝia preferata dolĉaĵo! Mi demandos Avinjon, kiel kuiri ĝin! Dankon, kara Stela, sen vi, tio jam neniam enirus en mian kapon!

## II. Kiel kuiri ĉokoladan torton Nigra Arbaro?

**Karina (K) babilas kun sia patrino Karina (K) babilas kun sia patrino avino (A) en la hejmo de la avino, naŭ tagojn poste.**

K – Avinjo, mi telefone anoncis al vi, ke mi venos, ĉar morgaŭ okazos la naskiĝtago de Panjo.

A – Jes, mi scias, karulineto, en tiu tago mi naskis ŝin! Kial tio estas granda problemo por vi?

K – Ankaŭ tion mi diris al vi, kara Avinjo, ke vi bonvole helpu min! Mi deziras kuiri por ŝi torton de Nigra Arbaro, sed mi ankoraŭ ne faris tiun torton.

A – Ĉu iun alian torton vi jam preparis, karulineto mia?

K – Ankaŭ aliajn ne tre ofte! Sed mi kontrolis en la reto, kiel prepari tiun ĉi dolĉaĵon, kaj mi trovas ĝin iom malfacila por mi.

A – Ĉu vi ne povis trovi pli simplan recepton?

K – Ne, ĉar ĝuste tiu ĉi estas la preferata torto de Panjo. Krome mi jam aĉetis la necesajn ingrediencojn al la recepto: saketo da kakao-pulvoro, unu kilogramo da sukero, duonlitro da konservita acida ĉerizo, botelo da ĉeriza brando kaj skatolo da lakto-kremo.

A – Mi vidas, ke vi jam zorgis pri ĉio! Mi aldonos ovojn, farunon kaj ĉokoladon. Do, ĉu ni komencu?

K – Jes, Avinjo!

A – Prenu tiun bovlon, kaj unue ni preparos la pastaĵon, karulineto! Jen la ovoj, dividu la blankaĵon de la flavaĵo. Atentu, ke ŝelo-peceto ne faletu en la ujon. Bone, Karina, vi estas jam tre lerta! Nun prenu sukero kaj necesas miksi ĝin kun la flavaĵo.

K – Kiom da sukero ni bezonas?





A – Aldonu ses kulerojn da sukero, kaj uzu tiun ĉi elektran ŝaŭmigilon; per ĝi eblas pli efike kirli. Ĉu vi vidas kiel bele heliĝis la ovoflavo kun la sukero? Ni alŝutu ankaŭ la kakaopulvoron, kaj kirlu ankoraŭ la tutan miksaĵon! Nun ni ŝaŭmigis la ovoblankon en alia bovlo, kun kulero da sukero, kaj ni miksis bele la du pastojn. Indas aldoni iom da salo. Jen la bakformo por la torto, sed, atendu, unue mi ŝmiros per butero ties internon. Tiel la pastaĵo ne tro bruliĝos ĉe la flankoj. Nun mi puŝos la paston en la fornon, por dudek minutoj.

K – Avinjo, ĉu nun ni komencu kuiri la kremojn?

A – Jes, tuj verŝu la sukron de la konservita acida ĉerizo en tiun ĉi poton, kaj metu la poton sur la gasfornelon! Tiel ni kuirus la ĉerizan kremojn. Kirlu, kirlu ĝin, rigardu, ĝi jam densiĝas, baldaŭ ĝi pretos. Poste ni devas atendi, ĝis ĝi malvarmiĝos, kaj ni aldonos ankaŭ la acidan ĉerizon.

K – Ĉu ni ne kontrolu nian torton en la forno?

A – Jes, ni jam povas!

K – Ho! Kiel bonaodoro!

A – Jes, ŝajnas al mi, ke ĝi pretas! Dum la pastaĵo malvarmiĝas, ni ŝaŭmigis la laktokremojn.

K – Mi mem faros tion!

A – Bone, kaj dume mi tranĉas la torton je tri partoj.

Do, ĉio jam pretas, kaj ni atente ŝmiras la ĉerizan kremojn kaj la laktokremojn sur la tranĉaĵojn.

K – Mi ŝmiras la kremojn sur la unuan tranĉaĵon, ... sur la duan, ... bele alta fariĝos la torto! Nun mi atente metas

ankaŭ la trian tranĉaĵon... – jen, ĝi pretas! Kio okazos al la restinta ŝaŭmigita laktokremo? Ĉu mi rajtas manĝi ĝin?

A – Tion ŝmiru sur la torton, kaj supren, kaj sur la flankon! Jen la raspita ĉokolado, alŝutu ankaŭ tion, kovru per ĝi la tutan torton!

K – Kaj fine mi metos la ĉerizojn kiel ornamaĵojn, ankoraŭ iom da ŝaŭmo kaj raspita ĉokolado ĉirkaŭ la ĉerizojn...

K – Rigardu Avinjo, kiel bela torto! Mi eĉ fotas ĝin.

A – Gratulojn karulineto, vi estas lerta sukerajŝtino! Panjo certe ĝojos pri via donaco!

### III. Kio estis la surprizo de la festo?

**Karina (K) babilas kun sia amikino Stela (S) telefone, post kelkaj tagoj.**

K – Saluton Stela!

S – Saluton Karina! Mi ĵus pensis pri vi, kio pri vi?

K – Mi vokis vin por demandi, kion vi faros morgaŭ vespere?

S – Fakte, nenion specialan. La kutima sabata vespero; la familio sidas antaŭ la televido, kaj mi antaŭ la komputilo. Kiel?

K – Por spekti kune filmon en kinejo, mi ricevis du biletojn de mia frato.

S – Volonte! Tre bone! Sed mi jam volis demandi vin, kiel sukcesis la datreveno de via patrino. Kiel sukcesis via torto-donaco?

K – Fin-fine sufiĉe bone, malgraŭ la akcidento.

S – Ne diru! Kiu akcidento okazis? Al kiu?

K – Ho, ĉu mi ankoraŭ ne menciis tion al vi? Imagu! Granda familia festeno





## Konversaciaj temoj

estis organizata, ĉi-foje eĉ pli granda ol kutime, ĉar Panjo fariĝis jam kvindek-jara. Invititaj estis geonkloj, gekuzoj, bofratoj, entute dek du personoj. Panjo eĉ rimarkis, ke bonŝance ni ne kredas je superstiĉoj, ĉar ni estis dek tri entute.

S – Sed kio okazis?

K – Tion mi estas rakontanta, Stela! Do, matene Panjo eliris el la domo por ...

S – Kiam matene? Kiun tagon?

K – Certe antaŭhieraŭ, merkredon, kiam la festo okazis. Laŭplane la festo devus komenciĝi ĉirkaŭ la kvina posttagmeze, sed kelkaj jam alvenis pli frue. Paĉjo telefonadis al diversaj restoracioj, Avino kaj onklingo Manjo pakis la duonpretajn manĝaĵojn por meti ilin en la frostigilon.

S – Kial?

K – Kio kial? Tial, ĉar Panjo simple ne povis stari sur la piedoj, eĉ ne marŝi. Ŝi mispaŝis, falis, kaj ne povis ekstari. Paĉjo tuj venigis ambulancon, la kuracisto diris, ke okazis elartikiĝo, Panjo ripozu kelkajn tagojn, kaj li vindis ŝian piedon, kaj donis sendolorigilon.

S – Do, mi jam komprenas! Kaj kio okazis al via torto? Ĉu ĝi bone sukcesis? Ĉu via panjo ĝojis pri ĝi? Ĉu ĝi estis bongusta?

K – Ne, Stela, vi ne komprenas la aferon! Ni ja ne povis festi hejme, se Panjo ne rajtas kuiri. Paĉjo trovis proksime restoracion, kaj ni ĉiuj iris tien por vespermanĝo. Mi kun la gekuzoj piede, Avinjo, Avo, Paĉjo aŭte, kun Panjo. Imagu, Paĉjo de la aŭto ĝis la tablo en la restoracio portis Panjon en siaj brakoj! Panjo ridis, kaj la tieaj gastoj aplaŭdis! Estis vere amuze! Mi havas mirindajn gepatrojn, ĉu ne?

S – Ho, mi povas imagi tion! Ne ofte videblas tia prezentado! Kaj via torto,

ĉu ĝi estis laŭ la gusto de via patrino?

K – Tion mi ne scias...

S – Ne? Kial?

K – Ĉar ŝi eĉ ne gustumis ĝin. Ŝi nur malfermis la grandan skatolon, kaj vidis mian torton. Ĝia aspekto tamen tre plaĉis al ŝi! Avinjo diris, ke la torto bone eltenas ankoraŭ kelkajn tagojn en la fridujo.

S – Sed kial ŝi eĉ ne gustumis ĝin?

K – En la restoracio, al la ĉefkelnero multe plaĉis, kiel mia patro kondutas kun Panjo. Ni diris al la ĉefkelnero, ke nun ŝi havas gravan datrevenon. Li do demandis, kio estas ŝia preferata torto, ĉar li, nome de la restoracio,







deziras tutan torton donaci al ŝi.  
Kion vi pensas, kion Panjo respondis?

## TASKOJ

### I. Legu atente la tekston, trovu la nekonatajn vortojn. Poste respondu la sekvajn demandojn:

- De kiu petis helpoj Karina?
- Kio estis ŝia problemo?
- Kiujn donacojn proponis la amikino?
- Kial ne akceptis Karina la proponon?
- Kial turnis sin Karina al sia avino?
- Kion respondis la avino?
- Kiuj ingrediencoj estis necesaj por la torto?
- Kiel Karina kaj ŝia avino preparis la torton?



- Kiuj estis invititaj por la naskiĝtaga festo?
- Kiom da gastoj estis entute?
- Kial la gastoj vespermanĝis en restoracio?
- Kion proponis la ĉefkelnero?

### II. Rakontu (skribe en formo de letero, aŭ voĉe al via kunlernanto):

- Kiam estas via naskiĝtago? Kaj kiam de viaj familianoj?
- Kiel vi festas vian naskiĝtagon?
- Kion vi donacas al viaj familianoj kaj al viaj geamikoj por ilia datreveno?
- Kio estas via preferata dolĉaĵo, kaj kiuj ingrediencoj estas por ĝi necesaj?
- Kiun dolĉaĵon vi povas mem prepari kaj kiel?

### III. Skribu:

- invitolon por via naskiĝtaga festo! Ne forgesu pri la dato, tago, horo kaj loko!
- LeTERon, nome de Karina al ŝia amikino, kaj rakontu, kiel okazis la vespermanĝo en la restoracio!
- LeTERon, al via amik(in)o, en kiu vi rakontu detale iun datrevenan feston. Ne forgesu mencii, ĉu tio plaĉis al vi, aŭ ne, kaj kial!

## Vortklarigoj

**Surprizo:** miriga kaj neatendita okazaĵo.

**Recepto:** detalaj instrukcioj pri la preparado de manĝaĵo aŭ trinkaĵo.

**Ingredienco:** unu ero en miksaĵo, manĝaĵo aŭ trinkaĵo, ekzemple ovo kaj sukero estas ingrediencoj de kuko.

**Bovlo:** larĝa, rondeta taso.


**Ŝaŭmo:** eki aeron en materialon, kaj per tio larĝigi kaj malpezigi ĝin, ekzemple kremon, akvon kun sapo.

**Artiko:** en la korpo, la loko kie la ostoj kuniĝas, kaj povas turniĝi (ĉe manoj, ĉe piedoj). Okaze de malĝusta movo, iu osto-parto povas eliri el sia loko; tio nomiĝas elartikiĝo.



# El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, plantojn, birdojn kaj homojn! – Kie ili estas? Kion ili faras? Kiujn vestaĵojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, plantoj, birdoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo?



Mireille Grosjean

# Aglaj okuloj kaj feinaj fingroj: Micaela Fahrni, horloĝfaristino

**Kiam ŝi estis 14-jara, Micaela estis mia lernantino. Vigla, laborema knabino.**

**P**oste mi ne plu vidis ŝin. Antaŭ nelonge mi revidis ŝin okaze de vizito en la horloĝ-muzeo de la urbo Le Locle. Ŝi rakontis al mi pri sia profesio: ŝi estas ne nur horloĝfaristino, sed lertigita por ripari tre malnovajn horloĝojn.

En 2016 komenciĝis kontaktoj inter ŝia dunganto la firmao Cartier en La Chaux-de-Fonds kaj la muzeo de imperiestra palaco en Pekino, Ĉinio. Pro tio, kiam la ĉinaj horloĝfaristoj en Pekino konstatis, ke ili ne kapablas ripari ses tre malnovajn horloĝojn, ili decidis peti helpon en Svislando. Problemo estas, ke la ĉina leĝo malpermesas al tiuj tre valoraj objektoj forlasi la landon. Do la ĉinoj malmuntis la horloĝojn kaj pakis nur la moviĝadojn, la internan mekanikan parton de la horloĝo; restis en Ĉinio la belegaj skatoloj abunde ornamitaj.



Skipo de 3 ĉinoj alvenis al Le Locle en 2017 kaj komencis la laboron kun svisa lerta kaj altnivela skipo, gvidata de Micaela. Ili laboregis dum 4 monatoj. Ili devis retrovi similajn pecojn en aliaj horloĝoj, fari novajn bezonatajn pecojn,

abunde ripari, fajli, skrapi, glatigi...  
Finfine ĉiuj moviĝadoj funkciis perfekte.

Tre zorgeme ĉiuj kune pakis la horloĝpartojn kaj Micaela flugis kun siaj novaj kolegoj al Pekino. Tie ŝi povis kontribui al la remeto de la moviĝadoj en la horloĝojn kaj kontroli la funkciadon de ili.

Tre interese estas, ke la fama ĉina filmistino Li Shaohong akompanis la ĉinajn horloĝfaristojn kaj faris belegan filmon de tiu nekredebla entrepreno. Vidu ĝin sur *youtube*. La ĉi-kunaj fotoj estas ekranfotoj de tiu filmo: [https://en.wikipedia.org/wiki/Cartier\\_\(jeweler\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Cartier_(jeweler)); [https://en.wikipedia.org/wiki/Li\\_Shaohong](https://en.wikipedia.org/wiki/Li_Shaohong); [https://www.youtube.com/watch?v=bjJ8i\\_FhtFO](https://www.youtube.com/watch?v=bjJ8i_FhtFO)


**Mireille Grosjean**  
Emerita instruistino





Mireille Grosjean:

# Nasr Edin Hoĝa: Ĉirkaŭ li ĉio abundas



**Abundas liaj nomoj. Foje oni diras Nasreddin, foje Goha aŭ Joha. Ne gravas. Vikipedio starigis liston de liaj nomoj: aperas 34 vortoj, nomoj!**

**A**bundas la landoj, kie li aperas, kie li estas menciita en la tradiciaj rakontoj, fabeloj, folklorajoj. Li estas konata de Balkanio ĝis Mongolio, de Kaŭkazo ĝis Pakistano. Origine li estis turko.

Li naskiĝis en 1208 kaj mortis en 1284, supozeble. Abundas la lokoj, kie oni asertas, ke li estis entombigita.

Abundas liaj titoloj: *ulema*, tio estas teologo de la islama religio, *mola*, *kadi*, do fakulo, instruisto pri la islama religio. Oni povas aldoni: filozofo, komentisto, iom aktoro.

Abundas liaj trajtoj: foje li estas saĝulo, foje li parolas idiote, foje li komentas vigle, foje li primokas akre. Li havas la rajton, la eblon primoki la potenculojn kaj la saĝulojn. En diversaj etnoj estas ĉe iu reĝo, persono, kiu en la kortumo havas la rajton senpune kritiki la reĝon; estis kvazaŭ ofico; tia persono ebligis alporti iom da humuro al la severaj kaj postulemaj paroloj de la reĝo. Tia "kortuma idioto" (laŭ la franca esprimo) aperis en la kortumo de diversaj reĝoj en Eŭropo tra la tuta historio.



Ĉu tia ofico nuntempe mankas? Eble... Eble niaj politikistoj traktas sin mem tro serioze pro manko de tiaj humurplenaj paŭzoj... Ankaŭ en Afriko oni observas la intervenon de tiaj personoj kun mokpermeso en la seriozaj kunvenoj.

Nasr Edin havis azenon. Kutime li sidis sur la azeno en la malĝusta direkto kaj rigardis malantaŭen. Absurdaĵoj abundis en lia buŝo kaj en liaj agoj, kune kun saĝaj rimarkoj kaj helpemaj aŭ ruzaj agoj.

Jen rakonto pri li por vi:

Dum la tuta posttagmezo Nasr Edin promenadis en la urbo kune kun du altnivelaj personecoj, religia gvidanto, nomita *imamo*, kaj juĝisto, nomita *kadi*. Venis la momento adiaŭi.

"Vi vere estas nekutima persono", diras la religiulo. "Foje oni povus supozi, ke vi estas malhonnestulo kun kapablo ŝteli kaj trompi iun ajn kaj tuj poste oni povas imagi, ke oni estas en ĉeesto de kompleta stultulo." La juĝisto plu parolas: "Estu nur unufoje honesta kaj diru al ni la veron: kiu vi estas en realo: trompisto aŭ idioto?"

"Dependas", respondas Nasr Edin.

"Tamen jen tio, kion mi povas diri al vi du en tiu ĉi momento: mi estas ekzakte inter ambaŭ."

Dirante tion, li povis diri trompisto al teologo kaj idioto al juĝisto, aŭ inverse... Vi decidu! Unesco decidis siatempe, ke la jaro 1996 estu la Jaro de Nasr Edin Hoĝa.





# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

**Gajdos Pál Miklós** (Paŭlo Gajdoŝ) el Debrecen en Hungario, instruisto de la lingvo Esperanto, la ekzamenanto en la ŝtataj lingvoekzamenoj pri Esperanto, proponas al vi "Kristnaskan popolkanton". Li tradukis la kanton en Esperanton. La fina versio de la kanto naskiĝis ĉi-jare en septembro. Pli da liaj (kaj de aliaj aŭtoroj) kantoj vi trovos en la retejo [www.kantaro.ikso.net](http://www.kantaro.ikso.net). Tie vi povas aŭskulti kaj vidi ĉi tiun kanton: [http://kantaro.ikso.net/en\\_la\\_nokto\\_de\\_kristnasko](http://kantaro.ikso.net/en_la_nokto_de_kristnasko).

## En la nokto de Kristnasko

*En la nokto de Kristnasko  
En Jesuo-naskiĝtago  
Festu gaje homo ĉiu,  
Nun la korojn ĝoj' plenigu!*

*Sur la lit' de Jesueto  
Mankis varma peplometo<sup>1</sup>,  
Tial pelton li ne havis,  
Lia ŝafideto vagis.*

*Jesueto ora pomo,  
Sanktmaria lia panjo,  
Per du manoj lin flegadas,  
Per piedoj lin luladas.*

*Kirje, kirje, eta bebo,  
Bet-Leĥema reĝideto,  
Kiu por ni bonon faris,  
Nin de la infero savis.*

En la nok-to de Krist- nas - ko En Je - su - o - nask - iĝ - ta - go

Fes-tu ga - je ho - mo ĉi - u, Nun la ko-rojn ĝoj' ple - ni - gu!



1) Peplometo: vata aŭ pluma litkovrilo.





Renée Triolle

# Nigruloj en la franca arto

“Nigra modelo” estis la temo de ekspozicio en la pariza muzeo Orsay.

**La rilato al “nigraj homoj” ŝanĝiĝis de post la difino fare de la franca antropologo kaj anatomiisto Cuvier (1769-1832), kiu klasifikis la homojn en tri rasojn: blanka, flava kaj nigra – “la plej suba, proksima al simioj”.**

**N**i scias nun, ke “rasoj” ne ekzistas, la koloro estas protektilo kontraŭ la suno (mia fratino, kiu instruis en Parizo, konstatis, laŭ la haŭto de la lernantinoj el Karaiboj, ĉu ili ĵus alvenis en Francion, aŭ ĉu ili de pluraj jaroj loĝas en Parizo!). Ni ankau scias, ke la unuaj homoj venis el Afriko: en valo de Omo en Etiopio estis trovita mumio de 195 000 jaroj antaŭ nia erao; kranio trovita en Maroko datumas de 300 000 jaroj antaŭ nia erao, kaj la lastaj esploroj tra DNA montras, ke la kromosomo Y ekzistis jam

de 380 000 jaroj kaj venis el Liberio. Do ni ĉiuj devenas de afrikanoj!

Sed la traktado de “negroj”, “nigruloj”, “afrikanoj”, estas ligita al la imperia historio de eŭropaj landoj. Jam antaŭ la malkovro de Ameriko fare de Kristofa Kolumbo, en la jaro 1415, Portugalio kaptis la islamanojn, forĵetitajn el Hispanio, kaj vendis ilin kiel sklavojn al entreprenistoj, kiuj ekspluatis ilin. Pli kaj pli komercistoj ekspluatis la homojn laŭ la triangula sklav-vojo: Eŭropo-Afriko-Ameriko. Laboro sur kampoj (sukerkano, kotono) necesigis multajn manojn, kiujn negristoj serĉis en afrikaj vilaĝoj, manojn, kiujn afrikaj vilaĝestroj senprobleme vendis al ili, kiuj revendis ilin en Ameriko (norda kaj suda).

Tamen jam en 1788 en Francio “Societo de Amikoj de Nigruloj” kreiĝis por promocii egalecon, subtenita de politikistoj Condorcet, Mirabeau /



## Bonvolu respondi la demandojn kaj prepari desegnaĵojn:



Viajn respondojn sendu ĝis la 30-a de novembro 2020 interrete al mi – kaj la desegnaĵojn al: Europejskie Centrum Edukacji Międzokulturowej, ul. Kołłątają 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska.

- Kiam ni plenigu niajn korojn per ĝojo?
- Al kiu mankis varma peplometo?
- Ĉu Jesueto havis pelton?
- Kiu luladis Jesuon?
- Ĉu eta bebo faris por ni bonon?
- Kiu estas la aŭtoro de la kanto?
- Kiu tradukis la kanton kaj en kiun lingvon?
- Desegnu Jesueton laŭ la vortoj de la kanto.

Valorajn premiojn fondis la pola organizaĵo: Europejskie Centrum Edukacji Międzokulturowej (Eŭropa Centro de Interkultura Edukado), [www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl)

## Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.



▶ *Mirabo'* aŭ abato Grégoire /*Greguar'*. Bolis franca revolucio (1789) kaj en 1791 sklavoĵ ribelis en Sandomingo; tiam estis inter 450 000 kaj 600 000 da sklavoĵ, fronte al 70 000 liberaj homoj. Nov-Hampŝiro kaj Danlando nuligis la



sklavecon en 1792. En Francio sklaveco estis nuligita en 1794 kaj deputitoj reprezentis transmaran Francion (vidu la pentraĵojn de Jean-Baptiste Belley / *Bele'*).

Liberigita sklavinino, kiu iĝis servistino en Francio, estis modelo por pentristino. (Vidu la sekvan portreton, nomitan "Portreto de negrino", kiu iĝis "Portreto de Madeleine"). Ŝi estas vestita en tradiciaj vestaĵoj (orelringo, kaptuko), sed ŝia sinteno reliefigas neoklasikan figuron de emancipita virino (nuda mamoo).

Sed liberigo de sklavoĵ ne plaĉis al komercistoj, kiuj lobiis, kaj en la jaro 1802 sukcesis restarigi sklavecon en francaj kolonioj: interrasaj geedziĝoj aŭ



alveno al Francio estis malpermesitaj, kvankam estis famaj miksrasuloj: la verkisto Aleksandro Dumas, aŭ la rusa poeto Puŝkin, kies avoj estis nigruloj.

En 1804 sendependiĝis la insulo Haitio kaj en 1805 oficiale finiĝis la komerco kun negroj en Francio; en 1803 Kanado malpermesis komercadon kun homoj; Nederlando nuligis sklavecon en 1812, Britio en 1830, Rusio en 1882, Brazilo en 1887. La plej konata estas la milito inter nordo kaj sudo de Usono rilate la sklavecon, nuligitan en 1865.

Ni notu, ke en 1848 ribelis kontraŭ imperiismo multaj popoloj en Eŭropo, kaj plian fojon oni malpermesis sklavecon, sed restis deviga laboro. Franca poeto Lamartine verkis la dramon "Toussaint-Louverture" pri la fama revoluciulo (1743-1803). En 1852 aperis la sukcesa libro "Kabano de Onklo Tom" de Harriet Becker-Stone, dum Manet en 1863 pentris la faman





portreton de prostituino “Olympia”, al kiu libera nigra servistino transdonas bukedon de admiranto.

Eblus supozi, ke jam meze de la 19-a jarcento Eŭropanoj komprenis, ke ĉiuj homoj egalas; artistoj vojaĝis (franca poeto Baudelaire/Bodler/ en Haitio, pentristo Gauguin /Gogen/ en Tahitio), tamen dum la Universala Ekspozicio en Parizo en 1877 la organizantoj venigis afrikanojn, indiĝenojn, spektitajn kiel nekonatajn bestojn.

Nigraj artistoj rolis en cirko, dancis, tre konata iĝis Josephine Baker (vidu ▼



la foton). Daŭre nigruloj inspiris pentristojn (ekz. Picasso aŭ Matisse), aŭ reklamistojn (Babania, kie simpatia nigrulo misparolas la francan lingvon). Dum la Unua Mondmilito, ekde 1917, oni bezonis pliajn fortajn soldatojn, kaj venigis senegalanojn, kiuj ĉefrolis en diversaj bataloj, eĉ se ili ne estis dece ekipitaj kaj devis adaptiĝi al frosto kaj neĝo.

En 1921 la fama literatura premio Goncourt /*Gonkur*/ estis atribuita al la nigra verkisto René Maran (1887-1960), pro lia romano pri troigo de la koloniistoj, sed necesis atendi ĝis la jaro 1956, por ke okazu la unua kongreso de nigraj verkistoj kaj artistoj, sub impulso de Alioune Diop, fondinto de la revuo “*Présence africaine*” – “Afrika ĉeesto”.


La poeto Aimé Césaire /*Sezer*/ deklaris: “Venis la horo de ni mem”, dum la prezidento-Verkisto Lépold Sédar Senghor /*Sengor*/ (1906-2001) kreis novan vorton “*négritude*” – “negreco”.



Tiu arta ekspozicio donis larĝan panoramon de evoluo de la mensoj rilate “nigran rason”, ekz. renomante la pentraĵojn “Nigrulo, portante keston”, kiu iĝis “Homo, portante keston”, aŭ “La negrino” iĝis “Portreto de Laure”, kie virino rekapas sian identecon kaj foriras nur la difino per haŭtokoloro! Ĉu la ekspozicio klarigas, kial afrikanoj daŭre restas “sklavoj” en la menso, ne plu sklavoj de eŭropaj koloniistoj, sed sklavoj de lokaj koloniistoj? Ĉe Unesko Afriko daŭre estas prioritato por edukado, akvo por ĉiuj ktp. Ne mankas talentuloj; ne estas nur futbalistoj aŭ muzikistoj.



# Ankaŭ al nia nesto (re)venos iam la festo






La rubrikon prizorgas Mónica Molnár

**L**a tempo pasas, la kronviruso restas. La Ulidoj povas reiri en la lernejon, sed la grandaj festoj, amikaj renkontiĝoj restas malpermesitaj. Dum la lerneja tempo oni havas ĉiuokaze malpli da tempo,

sed kelkaj Ulidoj komencas iom zorgi pro la jarfinaj festoj. Kiel ili okazos? Ĉu oni povos festi kune kiel Mina en la rakonto de Anne, aŭ ĉi-jare la komuna festo restos nur bela revo? Neniu scias la respondon.

<p><b>Anne de Bernardini: La kristnasko de la muso</b></p>	<p>La neĝo falis sur la malgrandan domon. Estas jam nokto, sed unu fenestro havas ankoraŭ lumon. Estas Mina, la muso, kiu ne dormas. Sed ne nur ŝi ne dormas. En la apuda arbaro Nini hakas kelkajn arbojn.</p>	<p>Mina skribis multajn leterojn por siaj amikoj: „Saluton amikoj, mi volas fari belan kristnaskfeston la 24an de decembro je la 5a ĉe mi. Ĉu vi venos? Diru al mi, se vi venos! Dankon, mia amiko! Mina”</p>
<p>Alvenas la mateno kun suno. Nini venas al Mina por doni al ŝi la arbon por kristnasko. „Ding-dong” – Dankon, Nini! – Nedankinde! – Ĉu vi ŝatus trinki kafon aŭ teon kun mi? – Dankon, sed mi ne povas. Mi devas disdoni ankoraŭ multajn arbojn. – Ne gravas. Ĉu vi bezonas helpon? – Ne, dankon. Ĝis revido, Mina! – Ĝis, Nini!</p>	<p>Nun, ke la arbo alvenis, ankaŭ Mina havas pli kaj pli da laboro por bone prepari la feston por siaj amikoj. Ŝi komencas per la dekorado de la arbo. Mina prenas la skatolon de la kristnaskaj dekoroj kaj komencas ornamati la belan arbon. La granda stelo ĉe la pinto estas tre bela. Iom post iom la arbo ŝanĝiĝas je bela kristnaskarbo.</p>	<p>Sed nur la bele ornamita kristnaskarbo ne sufiĉas por ke la festo estu sukcesa. Mina havas multajn ideojn en la kapo. Ŝi iras en la kuirejon por baki bongustajn kukojn por la invititaj amikoj. Ŝi preparas la ilojn: bovlojn, kulerojn, miksilon kaj preparas la ingrediencojn. Ŝi bone kontrolas la kuko-recepton.</p>



		
<p>Ho, Mina rimarkas, ke ŝi ne havas sufiĉe da faruno kaj ĉokolado por fari grandan kukon. Do, ek! Mina eliras la domon por iri fari aĉetojn en la urbo. Ŝi aĉetas farunon, ĉokoladon kaj ankoraŭ multajn aliajn aferojn.</p>	<p>Post la aĉetumado ŝi reiras hejmen. Jen, nun finfine ŝi havas ĉion por povi fini la grandegan kukon. Ĝi estas tre bela, plur-tavola, alta torto kun flava kremoj inter la tavoloj, ĉokolado sur la supro kaj belaj dekorajoj sur kaj ĉirkaŭ ĝi. Espereble bongustos!</p>	<p>Bone. La kristnaskarbo estas bela; la torto havas belan aspekton. Kio mankas? La donacoj! Jes, kutime oni trovas belajn donacojn sub la arbo. Mina komencas fari belajn donacojn, kiujn ŝi enpakas en multkolorajn paperojn.</p>
		
<p>Intertempe la amikoj ricevis la invit-leterojn de Mina. Ŝi sendis leteron al Kafo, la hundo, al Lili, la kuniklo, al la malgranda Katido kaj ĝia patrino (ili ne manĝas musojn!), al Nadine, la muŝo kaj ankaŭ por multaj aliaj amikoj. Ĉiuj akceptis la bonkoran inviton al la festo.</p>	<p>„Ding-dong”, „Ding-dong”, ... La sonorilo ne ĉesas soni la 24an de decembro je la 5a horo. La amikoj de Mina alvenas unu post la alia. Ĉio estas preta kaj perfekta por la festo. Antaŭ la manĝo kaj la malfermo de la donacoj, la amikoj ludas kune kaj ĝojas pri la belaj momentoj.</p>	

- Ho, kiom belas tiu ĉi rakonto! - suspiris Rakontemulido. - Eĉ mi ne povintus rakonti pli belan. Mi tiam sopiras ludi kaj festi kun niaj geamikoj! Ĉu ni povos organizi similan feston jarfine?

- Mi ne scias, sed ĝis tiam restas al ni ankoraŭ iom da tempo. Ni vidos la situacion kaj ni faros nian plej bonon. - respondis Revemulido. - Ankaŭ mi revas pri granda festo, sed ankoraŭ pli ol tio, mi revas pri tio, ke ĉiuj restos en bona sano. Tiunmaniere, eĉ se nun eble ne, sed poste ni povus havi multajn grandajn festojn, ĉiuj kune! Tio estos belege! Kaj ja, eble por tio nun bezonatas iom da komprenemo, iom da solidareco kaj iom da elturniĝemo. Se la situacio permesos la grandajn festojn tiel, ke ĉiuj povos resti en sekureco, tiam estu kaj ni festu.

Kaj se ne? Ni konstruos neĝhomojn, trovos aliajn manierojn resti en kontakto, babilu kaj ludi kune eĉ je distanco kaj malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj pasigi belajn momentojn je la fino de tiu ĉi stranga jaro.



Pensu pozitive kaj havu trankvilajn, ĝojajn jarfinajn festojn! Gravas ne la formo, sed la enhavo. Se via koro enestos, la problemoj forestos.





# La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

## Ĉi-jare la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj pro la koronavirusa pandemio estis organizita rete, kun subteno de la urbo Vroclavo.

**L**a festivalo okazis kun speciala dediĉo al Mila Van Der Horst-Kolińska, kiu ekde komenco de la festivalo subtenis ĝian disvolviĝon. Reta organizo de la kantfestivalo estis multe pli malfacila ol preparadi ĝin en pasintaj jaroj. La organizantoj devis subigi amason da malfacilaĵojn, kiel ekz. mallongigon de la laborgrupo pro malsano, lernadon de novaj ĝis nun ne konataj iloj, akceptadon de manko de komunaj renkontiĝoj pro pandemio, ĉar kunlaborantoj loĝis en aliaj urboj kaj eĉ landoj kaj cetere oni devis venki multajn neatendite naskiĝantajn problemojn ... Malgraŭ tio la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj estis sukcesplena. La festivalo, ĉi-jare vere estis ne nur eŭropa sed monda. Partoprenis en ĝi multaj esperantistoj el diversaj anguloj de la mondo, el Japanio, Brazilo, Ĉilio, Kolombio, Uzbekio, Pollando, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Svislando, Israelo.

Sufiĉis nur aliĝi kaj poste sendi filmeton kun kanto en Esperanto. Ĉi-jare estis tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. enstudia registraĵo. La aĝkategorioj estis la samaj kiel en pasintaj jaroj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj / 55-111 jaroj. La ĵurio, la aro da internaciaj specialistoj – esperantistoj kaj muzikistoj – pro escepta situacio pritaksis ĉefe lingvan kaj muzikan korektecojn. En kelkaj kategorioj la ĵurio decidis ne aljuĝi la unuan aŭ eĉ duan premion, se la kvalito de la kantoj lingve aŭ muzike ne atingis la akceptatan minimumon. Plie estis aljuĝita la ĉefpremio. Bedaŭrinde, pro teknikaj kialoj ĉi-jare oni rezignis pri aljuĝo de la publik-premio.

La rezultoj estis anoncigitaj dum la filma koncerto de Premiitoj, kiu okazis la 12-an de septembro, je la 16:00 horo, rete (<https://youtu.be/5zRvUW0qw5c>). La organizantoj unuafoje preparis la koncerton je tiu formo kaj tio ankaŭ estis malfacila tasko des pli, ke ĝi estis farita sub la premo de tempo. Ĉi-jare kiel gastoj elpaŝis fama jOmO el Francio kaj la pola ensemblo NaRaz el Góra. La pola ensemblo ekestis pasintjare speciale por nia unua Esperanta turneo por rekomendi la urbon Vroclavo pere de la lingvo Esperanto en diversaj landoj kun traduko en la lokan lingvon.

Honoran patronecon pri la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj akceptis Jacek Sutryk - la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, EUOKKA kaj Juna Amiko kaj Varsovia Vento kaj pola retradio KSON. La Radio KSON fondis belan premion. Ĉiu premiito en la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj havas eblon doni intervjuon en la radio KSON kaj prezenti sian repertuaron. Belan donacon al la premiitoj fondis ankaŭ vroclava artistino, Elżbieta Wodała donacante siajn florumitaĵojn t.e. ciferecajn grafikojn de bildoj faritaj el elementoj de sekigitaj plantoj.

Je la nomo de la organizanto, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, mi ankoraŭfoje elkore gratulas ĉiujn partoprenintojn, precipe la premiitojn.

Mi tre dankas al la juĝantoj pro ilia grava kaj ege malfacila laboro. Mi jam invitas vin partopreni venontjare, en la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

**Małgorzata Komarnicka**

Generala direktoro de  
Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj




Luiza Carol

# Inter iluzio kaj realo

Komentoj pri “La mirinda sorĉisto de Oz” de L. Frank Baum, traduko de H. R. Dreyer (Eldonejo Bero, Berkeley 2000 ▼) kaj traduko de Donald Broadribb (Eldonejo Mondial, New York 2012 ►).

**L**a mirinda sorĉisto de Oz estas ĉarma porinfana romano de la usona verkisto Frank Baum. Ĝi ĝuas grandan intereson en la Esperanta komunumo, sekve de kio ĝi estis esperantigita de 2 bonaj tradukistoj je distanco de nur 12 jaroj.

La protagonisto de la romano estas la ĉarma knabino Dorotea, kiu akcidente vizitas



strangan fantazian landon. Ŝi komencas sian vojaĝon en timiga etoso (ciklono, forportanta ŝin kune kun la tuta domo) kaj finas ĝin ĝuste kiam la cirkonstancoj estas plej agrablaj. Apenaŭ veninta en la landon de la mistera Oz, la knabino ricevas ege valoran ŝirmilon: la kison de la bona feino de la Nordo, kiu protektos ŝin kontraŭ ĉiuj eblaj danĝeroj. La tuta romano rakontas la aventurojn de Dorotea dum sia vojo hejmen. Oni povas eventuale supozi, ke la tuta vojaĝo en la lando de Oz estas sonĝo, sed alterne oni povas supozi, ke temas pri infana pupludo (alivorte, duone konscia sonĝo), aŭ spektaklo pri magio (fakte la limoj inter arto, ludo kaj sonĝo ĉiam malcertas).

La arto de Oz baziĝas sur ties kapablo konvinki la homojn, ke simplaj aĵoj (kiel la verdaj okulvitroj, la brana' cerbo, la silka koro kaj la kuraĝtrinkaĵo) estas sorĉitaj aĵoj.

Oni povus diri, ke Oz estas mensugulo, ĉar liaj sorĉoj evidentiĝas esti simplaj iluzioj.



Tamen, pere de sia arto, Oz ja sukcesas fortigi la memfidon de Dorotea kaj ŝiaj akompanantoj.

Iusence oni povus kompari tiun sorĉiston-iluziiston kun la aŭtoro de la romano. Samkiel Oz, la verkisto prezentas al ni iluzian mondon, kiu tamen helpas nin mediti pri la reala mondo. Fakte oni povus rigardi la arton de ajna verkisto kiel arton de iluziisto, kiu helpas nin mediti pri la reala vivo.

La vojaĝo tra la lando de Oz okazas pro la deziro de la knabino reveni hejmen. Tiu deziro fariĝas la spino de la tuta libro. Sed kial Dorotea volas tiom forte forlasi la amuzan, buntan kaj interesan landon de Oz, por reveni al sia griza usona hejmo kaj al sia enuiga ĉiutaga vivo? La Birdotimigilo eĉ esprimas klare sian miron pri tio, sed la knabino tuj primokas lin, dirante, ke, kiu havas pajlon anstataŭ cerbo, tiu ne povas tion kompreni. Jen amuza ŝerco, kiu igas nin mediti pri tio, ke onia amo al sia hejmo kaj lando estas subkonscia kaj natura sento de ĉiu homo. Aliflanke, tiun deziron reveni hejmen oni povas interpreti ankaŭ kiel deziron ne perdi la firman grundon de la realo kaj ne flugi senfine en fantaziaĵoj.

La tri amikoj, akompanantaj la knabinojn, t.e. La Stana Lignohakisto, La Birdotimigilo kaj La Malkuraĝa Leono, rolas kiel tri

pupoj, manipolataj de Doroteo, serĉantaj respektive koron, cerbon kaj kuraĝon. Pere de tiuj “pupoj” ankaŭ Doroteo maturiĝas dum sia vojaĝo en la lando de Oz. La novakiritan saĝecon ŝi bezonas por sia reala hejma vivo, kiun ŝi espereble kapablos plibeligi kaj plibonigi.

Ambaŭ tradukoj ŝajnas al mi fidelaj kaj belaj. Por via amuzo, mi donu al vi la eblecon kompari la tradukojn de la ŝerca poemeto deklamita de la klaŭno en la ĉapitro “La delikata Porcelana Lando”. Jen la koncernaj citaĵoj:

Laŭ la versio de 2000, la klaŭno deklamas: *“Vi tenas vin rigide/ kaj vi gapas vid-avide,/ Sinjorino, al la povra Klaŭno sprita./ Oni juĝu laŭaspekte/ ke vi staras tiel rekte/ ĉar sendube ĵus vi estis amelita!”*

Laŭ la versio de 2012, la sama klaŭno deklamas: *“Mia kara dam’/, Pro kio jam/ Okulo tre rigida?/ Kvazaŭ estas vi/ Nenio pli/ Ol fajrŝovil’ ridiga!”*

Ambaŭ versioj estas bele eldonitaj, kun ilustraĵoj, adaptitaj laŭ la originalaj desegnoj de W. W. Denslow. La eldono de 2012 estas eĉ preskaŭ luksa: ĝi havas altkvalitan paperon, multkolorajn kovrilojn kaj belegan grafikan aranĝon. La eldono de 2000 estas pli modesta, sed malpli multekosta. Mi egele ĝuis ambaŭ eldonojn kaj same entuziasme rekomendas ilin al legantoj je ajna aĝo.



# Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,  
ul. Kilińskiego 14/3,  
PL-59-300 Lubin,  
Pollando, rete:  
*malgosia.*  
*junaamiko@gmail.com*



## Magia festa periodo...

**Baldaŭ estos fino de la jaro 2020, la jaro, kiu ne estis amika por ni...**


**B**aldaŭ estos Kristnasko, bela festa tempo. Pri tiuj festaj tagoj ni pensas multe pli frue antaŭ ol ekbrilos la *Unua Stelo*. Tiu periodo estas magia kaj la senton de la magio plifortigos bona libro.

Tial kiam vi jam ornamas kristnaskan arbon kaj manĝos multajn bongustajn festajn kukojn, sidiĝu komforte en la fotelo kaj ripozante tralegu bonan libron.

Vi konvinkigos, ke magio agas... – Kiun libron? La lernolibron “Dek Fabeloj”, kiu estas prezentata en Klubo de Bona Libro. Ĉi tiu libro estas ideala por tiu magia tempo. Ĝi transportos vin en belan fabelan mondon, kaj, en la lingvon Esperanto. Vi almenaŭ por momento forgesos pri malfacilaĵoj de nia ĉiutaga vivo. Vi certe kun plezuro legos belajn fabelojn, ne nepre dum festaj tagoj, prilaborante ekzercojn... – Bonan legadon kaj sukcesplenan novan 2021 jaron!

## Klubo de bona libro

**B**iblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.



## Rekomendo

**P**or Biblioteko de *Juna Amiko* José de J. Campos Pacheco, la longdaŭra kunlaboranto de *Juna Amiko*, rekomendas la lernolibron „Dek Fabeloj”. Ĝiaj aŭtorinoj estas Charlotte Kohrs kaj Dorothy Kruger kaj ilustraĵojn preparis Alan Henderson.

La lernolibro estis kreita por grupa legado, aŭ hejma studado, kaj la aŭtorinoj dediĉis ĝin al la membroj de la Esperanto-Klubo de San Diego.



La libro = lernolibro konsistas el la konataj fabeloj kaj estas dediĉita al infanoj kaj ankaŭ al plenkreskuloj laŭ la regulo: ni lernas rapide, kiam ni ĝuas la lernadon. Detaloj en la fabeloj foje estas ŝanĝitaj, sed iliaj ĉefaj temoj estas la samaj. La plimulto de la fabeloj devenas el Eŭropo kaj kelkaj el Usono.

En ĉiu fabelo oni ofte ripetas la vortojn kaj frazojn kaj fine de ĉiu fabelo estas vortareto kaj speciala emfazo pri afiksoj. Tiu ripetado helpas pli flue paroli Esperanton. Cetere la fabeloj estas speciale aranĝitaj, laŭ progresiva ordo de



malfacileco. Ĉe la fino de la libro troviĝas ekzercoj pri la rakontoj. En la fabeloj estas bone akcentitaj ĝiaj herooj kaj ni povas legi la rolojn, deklami ilin parkere, aŭ poste prezenti

la fabelojn, uzante siajn proprajn vortojn, aŭ eĉ krei novajn scenojn... Solida laboro kun la lernolibro permesos plifortigi gramatikan lertecon, prononcon kaj fluan parolon.

Ne gravas, ĉu ni prilaboros la libron grupe aŭ sole, ni certe kun ĝuo plifortigos Esperantajn vortprovizojn, lertojn kaj memfidon.

## Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo

Konkurso ne nur por junaj legantoj.  
Rubrikestro: Małgosia Komarnicka.



**Ĉi-numere mi proponas viziti la landon, en kiu loĝas Anatolij Ionesov. Ĝi estas senmarborda lando, Uzbekio, kiu situas en Centra Azio.**

**A**natolij Ionesov estas esperantisto, fondinto kaj prizorganto de Enciklopedia projekto „Samarkandiana“.

## Kio allogas min al Uzbekio?

Mi prezentas al vi Uzbekion, Uzbekujon aŭ Uzbekistanon. Uzbekio sendependiĝis en la jaro 1991 kaj antaŭe ĝi estis parto de Sovet-Unio. La nomo de la lando devenas de la popolo de la uzbekoj, kaj ilia nomo devenas de Uzbek-Ĥan. Unue per kelkaj informoj konatiĝu



kun la lando, kiu estas nomata „la plej feliĉa lando en Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj“, laŭ *World Happiness Report* en la jaro 2016. Klopodu trovi la menciitajn lokojn en la teksto sur la mapo kaj poste tralegu la legendojn kaj faru konkursajn taskojn.

Mi do invitas vin al Uzbekio, al la lando, kiu surprizos ĉiun vojaĝanton per sia riĉa historio, beleco de historiaj restaĵoj kaj nekutime bonvolemaj homoj. Uzbekioj estas escepte agrablaj, gastemaj,

ridetemaj, kaj ĉiam varme gastigas turistojn. Vidu la flagon de la lando, kiu estas ne hazarde en tiuj koloroj.

La blua koloro signifas akvon kaj ĉielon, la blanka liberecon, la verda abundan rikolton kaj la ruĝa montras energion de la homoj.

La teritorio de Uzbekio estas dividita en dek du aŭtonomajn





provincojn kaj la ĉefurbo estas **Taškento** (uzbeke: Toshkent). La ĉefurbo estas politika, ekonomia kaj ankaŭ kulturscienca centro de la lando. En la ĉefurbo troviĝas multaj vidindaĵoj, konstruaĵoj kaj unika en Azio moderna metroo. Vizitante la urbon oni nepre devas ĉion viziti.

Oni nepre devas viziti ankaŭ la urbojn **Samarkando**, **Ĥivon**, **Buĥaro** kaj **Ŝahrisabz**, listigitajn en Monda Heredaĵo de Unesko. Ili estas perloj de arkitekturo kaj situas centre en la Silka Vojo, kaj danke al tio



ili estas atestantoj de disfloro kaj ankaŭ posta disfalo de imperio de Tamerlano (Timur). Nuntempe ni observas tragedion de la Aralo kaj konvinkiga, ke homo povas detrui pli rapide tion, kion konstruis la naturo dum jarmiloj...

**Samarkando** estas la ĉefurbo de la provinco samnoma, kaj ĝi estas fama pro sia arkitekturo. Samarkando estas tre malnova urbo, preskaŭ kun trimiljara historio. La urbo estas

situata laŭ la t. n. Silka Vojo. En la 14-a jarcento ĝi estis la ĉefurbo de granda imperio de Tamerlano (Timur). En la 19-a jarcento Samarkando fariĝis parto de Rusia Imperio. Alvenante al Samarkando vi nepre devas viziti interalie la arkeologian muzeon *Afrasiab*, la maŭzoleon *Gur-Emir*, la placon *Registan* (modelo de urboplanado en mezepoka Oriento), ensemblon *Ŝahi-Zinda*, *Bibi-Ĥanim* (la moskeo de Timur, la plej granda moskeo en la Centra Azio), la observatorion de *Ulugbek*, la maŭzoleon de *Hoĝa Danijar* (unu el plej gravaj kultlokoj en la urbo)...

**Ĥivon** oni nepre devas viziti pro tio, ke la tuta urbo estas enskribita en la liston de Monda Kulturheredaĵo de Unesko. Antaŭe ĝi estis la ĉefurbo de la antikva regno Ĥorazmo kaj nun estas la urbo en la provinco Ĥorazmo.

**Buĥaro** estas unu el la plej gravaj urboj de la lando kaj la ĉefurbo de la samnoma







provinco. En la jaro 1993 la malnova urbocentro de la urbo kaj ties konstruaĵoj, moskeoj kaj madrasoj<sup>1</sup> estis enskribitaj en la liston de monda kulturheredaĵo de Unesko.

Tamen vizitante Uzbekion, simile kiel aliajn lokojn, oni devas memori pri devigaj bazaj principoj. Antaŭ ol ni eniros en sanktejon, moskeon aŭ privatan domon, oni devas depreni ŝuojn. Ni ne portu mallongajn pantalonojn aŭ ĉemizojn sen manikoj (precipe virinoj).

Uzbekia kuirarto estas ege riĉa kaj diversspeca. La plej fama nacia plado estas pilafo (*palov*), tre satiga manĝaĵo kaj ĝi konsistas el rizo, viando, karotoj, cepo kaj kotonoleo. Alia nacia plado estas *shurpa*, t.e. supo produktita el grandaj pecoj de grasa viando kaj freŝaj legomoj.

Nacia trinkaĵo estas verda varma teo, kiun oni trinkas en tetrinkejoj (*ĉojhona*). En Taŝkento oni preferas grandparte nigran teon, sed ambaŭ teojn oni kutime trinkas sen lakto kaj



Buĥaro, la ĉefurbo de la samnoma provinco.



Maŭzoleo Gur-Emir en Samarkando.  
Fotoj de Anatolij Ionesov.

sukero. Estas ankaŭ populara dum varmaj tagoj malvarmetigita jogurto-trinkaĵo (*ayran*), sed ĝi ne anstataŭigas varman teon. Tradicia uzbeka pano (*non* aŭ *patyr*) estas ekbatita en la cirkla formo kun pli dika rando ĉirkaŭe.

Kiel deserton fine de tipa manĝaĵo oni povas gustumi freŝajn aŭ sekigitajn fruktojn, kompoton aŭ halvaon (*halva*) kaj aliajn dolĉaĵojn kun verda teo. Valoras mencii pri uzbekaj vinoj, kiuj ricevas

premiojn. Multaj vinfarejoj troviĝas en Samarkando kaj aliaj lokoj.

La klimato de Uzbekio estas tropika klimato kontinenta. Granda parto de la lando estas dezerto kaj do someroj estas longaj kaj varmaj kaj vintroj estas mallongaj kaj frostaj.

En la jaro 2018 estis fondita Uzbekia Esperanto-Asocio (UzEA), nova Esperanto-Asocio en Uzbekio.

Vizitu Uzbekion, ĉar ĝi ofte estas nomata “la lando de fabelo el mil kaj unu noktoj”.



Monumento de Amir Temur en Ŝahrisabz.



# Legendoj

Anatolij Ionesov proponas du legendojn. Unu legendo estas pri Bibi-Ĥanim, la edzino de Amir Timur, kiu decidis konstrui belegan moskeon por plezurigi sian edzon. Ĉu la surprizo plaĉis al la edzo? Por ricevi respondon legu la legendon. Alia legendo estas pri la plej bongusta pano en la mondo... – Kie oni bakas ĝin, vi ekscios, legante la legendon.



Ensemblo Shahi-Zinda en Samarkando.

## Legendo pri Bibi-Ĥanim

Pri la Samarkanda katedrala moskeo de Timur cirkulas multaj legendoj. Laŭ unu el ili, dum Amir Timur estis en sia vica militiro, lia plej ŝatata edzino Bibi-Ĥanim decidis surprizi kaj plezurigi sian edzon per konstruado de belega moskeo en Samarkando. Ŝi vokis faman lokan arkitekton kaj komisiis al li konstrui la grandiozan moskeon. Bibi-Ĥanim donis multajn ŝiajn personajn trezorojn por financi la projekton. Laboroj baldaŭ komenciĝis kaj je ĝojo de Bibi-Ĥanim la konstruado rapide progresis.

Ŝi ĉiutage vizitis la konstruejon kaj okazis tiel, ke la arkitekto enamigis je Bibi-Ĥanim. La moskeo estis jam pli ol duone konstruita, sed neatendite la arkitekto

ĉesigis la laboron kaj starigis antaŭ Bibi-Ĥanim la kondiĉon, ke li finkonstruos la moskeon, nur se ŝi permesos al li kisi ŝin. Nature ŝi indignis kaj rifuzis tiun arogan postulon de la arkitekto. Tamen intertempe venintaj heroldoj informis, ke Timur baldaŭ revenos al Samarkando kun la vica venko el la militiro, kaj Bibi-Ĥanim ne kuraĝis montri al la potenca edzo la nefinitan konstruaĵon. Do, longe hezitinte, finfine ŝi estis devigita cedi al la arkitekto kaj diris al li, ke ŝi permesos al li unufoje kisi ŝin, sed nur tra sia manplato. Ŝi metis sian manplaton al sia vango kaj la arkitekto kisis ŝin. Konstrulaboroj rapide rekomenciĝis kaj baldaŭ la belega moskeo estis finkonstruita. Tamen la kiso de la arkitekto estis tiom arda, ke ĝi lasis spuron sur ŝia vango.

Baldaŭ Timur revenis al Samarkando kaj surprizite ekvidis la grandegan moskeon, kies belo ravis lin. Li tuj ekrapidis al sia amata edzino, por esprimi al ŝi siajn dankojn kaj admiron, sed neatendite li rimarkis sur ŝia vango spuron de la kiso. Koleriĝinte, li postulis klarigojn kaj Bibi-Ĥanim devis ĉion rakonti al li. Furioziĝinte, la mondkonkerinto ordonis tuj venigi la arogan arkitekton por ekzekuti lin, sed laŭlegende



Ensemblo Shahi-Zinda en Samarkando.



Samarkanda pano. Fotoj de Anatolij Ionesov.

la arkitekto fuĝis al la pinto de la alta minareto kaj kiel anĝelo flugis al la ĉielo...

Tion rakontas unu el la legendoj. Malgraŭ tio, ke fakuloj opinias, ke la prezentitaj en ĝi okazaĵoj en realeco ne okazis, kaj ke la moskeo estis konstruita de Timur mem, sed la legendo daŭre vivas...

## Legendo pri samarkanda pano

Bongusteco kaj unikeco de samarkanda pano famas jam dum jarcentoj. Foje emiro de Buĥaro ekvolis, ke oni baku samarkandan panon en lia ĉefurbo. Tiucele li ordonis al ĉiuj bakistoj en la urbo baki samarkandan panon. Ili ĉiuj provis, sed iliaj klopodoj ne sukcesis. Tiam la emiro ordonis venigi al Buĥaro la plej konatan samarkandan panbakiston, kies nomo estis Abdulatif. Veninte al Buĥaro, Abdulatif provis baki samarkandan panon, sed ankaŭ li malsukcesis. Post tio la emiro de Buĥaro ordonis alporti farunon el Samarkando. Oni alportis farunon, sed Abdulatif denove malsukcesis baki same bongustan panon kiel tiun en Samarkando. Tiam la emiro de Buĥaro ordonis alporti akvon el Samarkando.

Akvo estis alportita, sed ankaŭ ĉi-kaze ĉiuj provoj de Abdulatif estis vanaj. Tiam la emiro de Buĥaro ordonis alporti aeron el Samarkando, sed finfine li komprenis, ke tio ne estas ebla kaj ke vera samarkanda pano povas esti bakita nur en Samarkando...

Se vi dubas pri tio, venu al Samarkando kaj mem gustumu nian faman panon. Oni diras, se iu almenaŭ unufoje gustumis samarkandan panon kaj trinkis bongustan samarkandan

akvon, tiu nepre revenos al Samarkando. Do, *Huŝ kelibsiz!* – Bonvenon!

LA KONKURSA TASKO estas la jena: Desegnu aŭ pentru bildo(j)n, kiu(j) bildforme prezentos uzbekajn legendojn. Kreu ankaŭ 30 demandojn pri la tuta teksto de la rubriko *Legu kaj Ĝuu*.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko 'Konkurso – legendo' ĝis la 30-a de novembro 2020 al la adreso Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątają 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska. La valorajn premiojn fondis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (*pole: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej*).



Samarkanda pilafo kun koturnaj ovoj.



Mireille Grosjean

## Kian stultan ideon mi havis...

Li alvenis en la prelegsalonon iom antaŭ la komenca horo. Li alportis komputilon. Iom poste li revenis kun projekciilo kaj elektra kabloj. Li instalis ĉion.

**M**i legis gazetojn dum atendo. La publiko iom post iom ariĝis en tiu salono de kulturcentro en Ĝenevo, Svislando. La komenco devis okazi je la 19-a horo. La temo de la prezento estis: rasismo kontraŭ nigruloj, kadre de la februara Internacia Semajno kontraŭ Rasismo.

Li, tiu alta afrikdevena viro kun longaj haroj, iris kaj revenis, por ĉion bone organizi kaj instali. Proksimume je la 19-a kaj kvin li, starante antaŭ la publiko, ekparolis al ĉirkaŭ 30 personoj: “Saluton! Bonvenon! Mia nomo estas Kanyana Mutombo; mi estas ĉefa konsilanto de Unesko pri rasismo kontraŭ nigruloj, doktoro pri internaciaj rilatoj. Mi parolos al vi pri rasismo kontraŭ nigruloj. Ni devas kompreni, ke ekzistas islamofobio, homofobio, antisemitismo; tamen rasismo kontraŭ nigruloj havas siajn ecojn, siajn



Prizorgantino de la kulturcentro Club 44

Kanyana Mutombo



historiajn fontojn; ĝi ne nepre similas al la tri menciitaj fenomenoj. (...)”

Lia prelego estis ege interesa. Li montris tra la historio, ke oni konstruis rasismon por senzorge laborigi homojn en Ameriko post perforta ellandigo el Afriko. Mi eksciis multon okaze de tiu prelego kaj povis poste organizi alian prelegon de li en alia urbo. Li fondis unikajon en Eŭropo: *Université Populaire Africaine de Genève* (Popola Afrika Altlernejo de Ĝenevo) kaj estas ĝenerala sekretario de CRAN, *Carrefour de Réflexion et d'Action sur le racisme anti-noir en Suisse* (Loko por pripensi kaj agadi kontraŭ rasismo kontraŭ nigruloj en Svislando).

Monatojn poste revenis al mia menso la ideo de tiu 19-a horo: “Jen la teknikisto, kiu ĉion instalas. Poste venos blankula preleganto.”

Mi rakontis tiun ideon al li kaj mi konfesis ĝin al li. Ni kune ridis pri ĝi. Tiu stulta ideo montras al mi, ke mia cerbolavado kontraŭ rasismo ankoraŭ ne estas kompleta.



Renato Corsetti

# De la 13-a jarcento en Ŝirazo, al la nuna tempo ĉe UN en Nova Jorko

En la 13-a jarcento en Persujo en la urbo Ŝirazo vivis granda verkisto, kies plej konata nomo estas Sadi', esperantigita en PIV kiel Sadio.

**L**i estas unu el la ĉefaj persaj verkistoj de ĉiuj tempoj. Unu el liaj poemoj trovis sian vojon al la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Nova Jorko. Jen la poemo en mia traduko:

*Vi estas unu, filoj de Adamo,  
kreitaj de la sama amo-flamo.*

*Se pro problemo, vundo aŭ malsano  
unu suferas, ploru ĉiu ano.*

*Se vi ne zorgas pri alia homo,  
vi ne plu indas je la sama nomo.*

Kompreneble mi ne estas Sadi' kaj Esperanto ne estas la persa lingvo, kaj do mia traduko redonas fidele la enhavon en vesto akceptebla en Esperanto, sen la originala ludo inter longaj kaj mallongaj vokaloj.

La rakonto pri la vojaĝo de tiu poemo estas bela rakonto, kiun mi ege maldetale rakontos.

La reprezentanto de Persujo ĉe la Ligo de Nacioj estis en difinita periodo



Mohamad Ali Forugi, eldoninto de la verkaro de Sadi'. Li diris dum bankedo, ke la delegito de Albanujo, lerninta la persan, kiam Albanujo estis ankoraŭ parto de la turka imperio – ĉiuj kleraj islamanoj en tiu epoko konis la persan, kiu estis la literatura lingvo de la islama mondo – proponis ke ĝuste tiu poemo estus taŭga devizo de la Ligo de Nacioj.

La propono neniam realiĝis, kiel cetere la propono iniciatita de la persa delegitaro pri Esperanto, sed en Persujo dum jardekoj oni pensis, ke almenaŭ la propono pri la poemo de Sadi' realiĝis. La reprezentanto de Irano ĉe UN en la 1950-aj jaroj, Mohamed Ĝavad Zarif, esploris ĉiujn sidejojn de UN kaj trovis nenion pri tiu poemo. Tiam

la posedanto de fama tapiŝo-vendejo en Esfahano, informis lin, ke li havas grandan tapiŝon, 5 metrojn oble 5, kun tiu poemo de Sadi' enbrodita, kiun li volonte donacus al UN. Kaj fine en 2005 tiu tapiŝo pendis en muro de kunvensalono en Nova Jorko apud same granda ĉina tapiŝo. La enhavo de la poemo estas konvena por UN kaj kongruas kun la Deklaro pri Homaj Rajtoj, kie unua artikolo diras: Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencen, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco.

Tion diris 8 jarcentojn antaŭe Sadi' en Ŝirazo. Do, ne estas surprizo, ke iranaj esperantistoj estas pretigantaj la eldonon de unu el liaj ĉefverkoj, **La florejo**, kiu laŭeble baldaŭ aperos.

Informoj pri Sadi' kaj pri la verko riceveblas ĉe Keyhan Sayadpour, [ksayadpour@gmail.com](mailto:ksayadpour@gmail.com).





# Kvar legendoj

La legendoj estas nove formulitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, Kubo, laŭ tekstoj, aperintaj en la kuba junulargazeto *Zunzún*.

## La ŝafisto kaj la filino de la Suno

### Perua legendo

En Kusko, ĉefurbo de la inkaa imperio, ĉiujare la plej bela virgulino estis destinita al la Suno – la dio de la inkaoj – kaj estis enfermita en la granda palaco kun grandega parko.

Iam, la tiujara virgulino, nomata Ĉukijanto, promenis en la parko por kolekti florojn. Tie ŝi ekkonis la ŝafiston Akojanapo. Kaj ili tuj enamiĝis.

Kiam ŝi revenis en sian ĉambron, ŝi pensis jam nur pri sia amato. Kaj simile okazis kun la ŝafisto, kiu pensis: „Neniam mi povos revidi ŝin. Mi scias, ke la morto estas la puno por tiu, kiu amas filinon de la Suno.”



Kiam la patrino de la junulo eksciis pri la okazaĵo, ŝi diris al li: „Ne malĝoju, filo; mi helpos vin. Ĉu vi vidas tiun hokbastonon? Ĝi estas magia bastono. Eniru ĝin.”

Kaj tiel Akojanapo faris.

Sekvamatene la patrino iris en la palacon kaj en ties parkon. En la parko ŝi vidis Ĉukijanton, kaj ŝi donacis la hokbastonon al la knabino.

Ĉukijanto poste iris kun la hokbastono en sian ĉambron kaj estis tre malfeliĉa. Ŝi pensis: „Se mi povus revidi tiun knabon...”. En tiu momento Akojanapo aperis el la magia hokbastono...

Iun matenon Ĉukijanto foriris el la palaco kaj forlasis ankaŭ la teritorion de la palaco, irante al la kamparo kun la hokbastono.

Sed gardisto de la palaco sekvis ŝin kaj vidis, kiel la junulo eliris el la hokbastono.

La geamantoj, perceptante tion, forkuris. Ili kuris longe. Noktiĝis, kaj brakumante unu la alian, ili endormiĝis.

Matene, la unuaj sunradioj tuŝis la geamantojn, kiuj iom post iom transformiĝis en du grandajn ŝtonojn.

Ekde tiam, tiuj, kiuj iras al Kalko en Peruo, vidas du belegajn montojn, kiuj memorigas pri la amo inter la ŝafisto kaj la filino de la Suno.

## La legendo de Marilopo

### Kuba legendo

En la 16-a jarcento loĝis en teritorio, kie hodiaŭ troviĝas la golfeto Jagua (elparolu: Haŭa) ĉe la urbo Cienfuego, tre bela mestizino, filino de indiĝenino kaj hispano, kun bruna haŭto, nigraj hararo kaj okuloj, gaja, bonkora kaj ŝatanto de kantarto kaj de floroj. Ŝi nomiĝis Marilopo, kaj multaj junuloj deziris edziĝi al ŝi.



Iun tagon Ĵano la Terurulo, ŝipestro de piratŝipo, ekvidis ŝin kaj tuj sentis grandan pasion por ŝi. Sed kiam li deklaris sian amon al ŝi, la knabino respondis: „Ne insistu, sinjoro!” Poste la malbonulo ofertis juvelojn, vestaĵojn, kaj denove la knabino rifuzis lin kun ĉiuj liaj donacoj. „Restu kun viaj riĉaĵoj; mi ne bezonas ilin.”

Freneze la pirato provis brakumi la knabinon, sed tiu forkuris por savi sin.

Ĵano kun sia sekvantaro postkuris ŝin, kaj kiam ili estis jam kaptontaj la knabinon, ekkreskis ĉirkaŭ ili dorno-veproj<sup>1</sup>.

Tiam la pirato Ĵano prenis sian pistol-egon, pafis al la knabino kaj vundis ŝin ĉe la frunto. En tiu momento tondris, kaj la fulmo bruligis la herbaron kaj ankaŭ la korpon de la knabino.

La piratoj vidis kun timo, kiel el la korpo de la knabino naskiĝis planto kun flavaj floroj, kiu ekde tiu momento nomiĝis marilopo<sup>2</sup>, memorigante tiun belan junulinon, kiu transformiĝis al tiu floro.

1) Vepro: tufo de sovaĝaj kreskaĵoj.

2) Marilopo: floro, *turnera olinefolia*

## La konkeranto de la fajro

### Amerika legendo

Antaŭ longa tempo, en nordamerika tribo vivis knabo kun rapidaj kaj fortaj piedoj; pro tio li estis nomata Rapidpiedulo, kaj li estis ĉiam akompanata de lupo aŭ de kojoto, kun kiuj li ĉiam samrapide kuris.



Somere li vidis, kiel la viroj de lia tribo kaptis fiŝojn per siaj manoj, kaj la virinoj elradikigis manĝeblajn plantojn. Sed vintre li ege suferis vidi multajn el sia tribo morti pro malvarmo.

Iun tagon li demandis la kojoton: „Diru, amiko, kion mi povas fari, por ke mia tribo ne tiom suferu?” Kaj la kajoto respondis: „Vi devas iri kaj atingi fajron en la fajromonto, kaj tie akiri iom da tiu lumo, kiu ege utilos por viaj tribanoj. Sed en tiu montaro estas fajrospiritoj, kiuj gardas ĝin.” – „Jes, mi kunportos la fajron. Helpu min”, respondis la knabo.

Kaj li foriris tuj kun cent fortaj junuloj de sia tribo kaj kun la kojoto.

Je la fino de la unua tago li lasis survoje la plej malfortan knabon inter ili, dirante al li, ke li paciencu atendu la revenon de la aliaj. Ĉiun sekvan tagon okazis same. Fine, Rapidpiedulo alvenis al la pinto de la Fajromonto. Sed la kojoto antaŭiris, kaj ruze defiante la multajn danĝerojn de la fajrospiritoj, elprenis trunkon, por kiu ĝi akiris la fajron. La kojoto kuregis, ĝis kie troviĝis Rapidpiedulo, kaj transdonis la fajron al li, ĉar tiu amika besto estis jam tro laca.





Piedrapidulo kuris kaj kuris, ĝis li retrovis la lastan amikon lasitan survoje kaj transdonis la fajron al li. Tiu rapide ekkuris, kaj tiel la torĉo flugis de mano al mano senhalte, ĝis ĝi atingis la tribon.

La tribanoj, laŭ konsilo de la kojoto, faris rondan fajrujon el la grandaj ŝtonoj kaj plenigis ĝin per arbobranĉoj, kiujn ili starigis piramide. La fajro, konsumante la branĉojn, varmigis la ŝtonojn, kaj tiuj, dum la tuta nokto, varmigis la ĉirkaŭsidantan tribon.

Ekde tiam la kojoto portas spuron de fajro ĉe unu flanko, kaj ĝia amiko Rapidpiedulo estas nomata la konkeranto de la fajro.

## La legendo de la planto mateo

### Gvarania legendo<sup>1</sup>

Rakontas la gvaranioj, ke antaŭ longa tempo, kiam la tribo vivis ankoraŭ nomade, iu el la maljunuloj jam ne havis la necesan forton por fari la longajn marŝojn. „Mi estas preskaŭ senforta por daŭrigi kun vi. Bonvolu atenti mian filinon Jarijo. Ŝi estas junulino kaj meritas la akompanon de junuloj.” – „Mi estos, kie estos vi, paĉjo. Mi estu via filino kaj filo samtempe. Mi lernos ĉasi kiel viro kaj kuiri kiel virino.”


Kaj estis tiel. Ŝi rapide lernis ĉasi, fiŝkapti kaj kolekti fruktojn el la ĝangalo, kie la tribo decidis resti. Ŝia patro, dankante pro la zorgo

de sia filino, petis la dion Tupao, ke ĝi rekompencu ŝin.

Iun tagon subite aperis malsata fremdulo antaŭ la tendo, en kiu loĝis la maljunulo kaj lia filino. Jarijo afable bongustan buljonon, kaj ŝi ankaŭ enlitigis lin en komfortan liton, por ke li ripozu tie kaj ricevu protekton dum la nokto, ĉar ekstere, en la ĝangalo, estas multa danĝero.

La sekvan matenon la fremdulo konfesis al la knabino, ke li estas la dio Tupao. „Mi ne foriros sen rekompenci vin”, diris la dio al la knabino. „Mi kreskigu novan planton, kiu ricevos vian nomon. Kaj tiel vi estas ekde tiu ĉi momento nemortemulo.” Li ankoraŭ ne estis fininta tiun frazoon, kiam el la grundo aperis planto, nome mateo, kreskis kaj montris siajn foliojn.

1) *Gvaranio*, hispane *guaraní*, estas indiĝena tribo en Sudameriko.







# Gest-lingvo(j)

**Vi eble rimarkis dum la pandemio, ke multaj ŝtatestroj, kiuj alparolas la publikon ĉe televido, estas helpataj de alia homo, kiu en angulo mangestas. Tiuj homoj estas “tradukistoj”, kiuj tradukas la parolatan lingvon en signolingvon por surduloj.**

**E**n antaŭa numero de *Juna Amiko* ni atentigis vin pri la bezono flegi siajn orelojn, por konservi la aŭdkapablon dum la tuta vivo. Bedaŭrinde iuj naskiĝas kun difektita aŭdkapablo, kaj do neniam aŭdos, sekve iĝos “mutuloj”, ĉar ili ne povas reprodukti sonojn; aliaj iĝas surdaj pro akcidento aŭ pro la aĝo. La plej fama surdiĝinto estas certe la fama komponisto Beethoven (1770-1847), kiun la tuta mondo honoras ĉi-jare pro la 250-a datreveno de lia naskiĝo.

Homo bezonas komuniki kun la aliaj (familianoj, amikoj, instruistoj, kolegoj) kaj sekve inventas manieron komuniki per gestoj; supozeble multaj el vi vidis la usonan serion kun Zorro kaj lia servisto Bernardo, kaj vi rimarkis, ke ne nur la manoj kontribuas al komprenado, sed ankaŭ la vizaĝesprimoj. Iuj legas sur la lipoj: se vi permesas personan sperton, mi vizitis mian britan korespondantinon, kies pli aĝa filo naskiĝis surda. La handikapon oni malkovris, kiam li estis 2-3-jara, ĉar li konstante restis ĉe la juĝoj de la patrino. Nun li estas 30-jara kaj laboras kiel informadikisto. Dum nia vizito li restis la tutan matenon kun mi, legis sur miaj lipoj, kaj tiam mi malkovris, ke kelkajn anglajn sonojn mi mispronocas! Aŭdanto komprenas, sed se mi mismetis la lipojn

aŭ la langon, mi sekve kreis problemon por li! Eble iuj el vi lernis legi per metodo, kiu kongruas, por ke surduloj ne aŭdu ekz. vokalon, sed per la vibrado ĉe la gorĝo rilatigu la vibradon kun unu litero.

Bela ekzemplo estas brita familio: la gepatroj, surdaj, komunikas per gestoj kaj sekve la 5-monataj ĝemeloj same komunikis inter si per gestoj, el kio fakuloj konkludis, ke bebo kapablas komuniki ege pli frue, se la parolorganoj estus finfunkciaj tiom frue.

## Fiksitaj signolingvoj

En 1880, dum kongreso de kuracistoj en Milano, lingvistoj konkludis, ke penso povas manifestiĝi nur per la parolo! Tiutempe gestlingvo estis malpermesita, sed kaŝe uzata en specialaj institucioj (ofte religiaj), kiuj akceptis la handikapitajn infanojn. De tiam progresis scienco, kaj aperis tra la mondo diversaj signolingvoj. Eble ili ne ekzistas por la 7000 lingvoj, sed certe por la plej uzataj. Kvankam ekzistas “internacia” signolingvo por ekz. internaciaj simpozioj, ĝi ne estas ŝatata de surduloj kaj ne mankas ekzemploj, kiam surduloj petis “tradukon” en sian nacian signolingvon. La plej fama instituto en la mondo estas Gallaudet College en Vaŝingtono, en Francio ekzistas 4 – kaj en via lando?

Ni vidis, ke komunikado esprimiĝas ankaŭ per la tono: ne estas la sama intonacio por demando, surprizo, kolero, ĝojo ktp. Kiel tion traduki? – Ne per mangestoj, sed per vizaĝgestoj kaj vizaĝesprimoj! Sekve kun maskoj pro la pandemio, surduloj ankoraŭ pli suferas!

Do, eĉ se vi ne lernos la signolingvon, tre amuzan por infanoj, provu ĉiam paroli klare, ne tro rapide, bone prononci la vortojn (ne formangante la duonon), en plena lumo, por ke aŭdhandikapulo povu bone vidi viajn buŝon kaj manojn. **Renée Triolle**





Renée Triolle

# Domeno: ĉu ludo aŭ matematiko?

**Supozeble ĉiuj el vi konas tiun ludon: domeno. Temas pri rektangulaj tabuletoj, blankaj, kun reliefaj nigraj punktoj.**

**Ŝ**ajne tiu ludo naskiĝis en Ĉinio, eĉ se oni trovis samtipan ludon en la tombo de la egipta faraono Tutankamon. Ili aperis en Gaŭlio (nuna Francio) jam en la 1-a jarcento de nia erao, sed vere famiĝis ekde 1760 en Italio. La pecetoj estis unue el ostoj, poste ankaŭ el ligno, eburo, perlamoto<sup>1</sup>, kaj de post la Unua Mondmilito (1914-1918) el plasto. Ĝi konsistas el 28 tabuletoj, kiujn oni kuŝigas sur tablon. Ĉiu peco prezentas du reliefajn nombrojn, de 0 ĝis 6. La ludantoj devas kunigi la nombrojn. Laŭdire, ili inspiris Louis Braille, kiu inventis alfabeton por nevidantoj laŭ la sama principo. Tiu ludo miksas hazardon kaj pensemon, eblas



ludi duope, triope aŭ kvarope, ekde la 3-a jaro. Nun ekzistas konkurso; vi kreas aron da starantaj domenoj; kiam vi puŝas unu, ĝi faligas alia(j)n ktp. Eĉ en politiko oni parolas pri "efekto domeno", kiam iu evento influas tutan serion de aliaj.

## Kaj nun surprizu viajn amikojn:

Elprenu kompletan seton de domenoj (kun nombroj de 0 ĝis 6) kaj diskrete eliru unu el ili (ne prenu duoblan ekz. 5-5). Ekz. 5-2. Petu de viaj amikoj ludi; tio estas fari la plej longan ĉenon. Antaŭ ol ili komencu, sur paperon skribu la du nombrojn 5-2 kaj anoncu, ke vi skribis la du nombrojn, kiuj kompletigos la ĉenon. Kiam finiĝis la ĉeno, montru vian paperon. Surprize! Efektive fine de la ĉeno mankas viaj du nombroj.

Kial? Ĉiu nombro troviĝas sur 6 tabuletoj: 0-5; 1-5, 2-5, 3-5, 4-5, 6-5, same por la 2: 0-2, 1-2, 3-2, 4-2, 5-2, 6-2. Ĉiam 5 devas tuŝi alian 5; ĉar vi forprenis unu, ne plu estas paro, do unu domeno estos orfo kaj restos fine de la ĉeno! Jen via magio: vi povas kompletigi kaj fini la ĉenon.

## Rilato kun matematiko

Tio povas helpi kontroli, ĉu eblas konstrui grafaĵon per unu sola krajonaĵo, ne pasante du fojojn ĉe la sama punkto. Grafaĵoj helpas en diversaj kampoj, por vidigi kompleksajn retojn (interreto, elektra, voja retoj ks).

1) Perlamoto: interna, ĉielarka, brilanta tavolo de konko.



Mireille Grosjean

# Legu kaj ordigu

(laŭ sugesto aperinta kadre de VEKI)

## De vespero al mateno

(Vicigu la frazojn laŭ logika sinsekvo)

En la sonĝo la eventoj konsistas el pasintaj travivaĵoj. La piedoj enŝuiĝas. La infano iras al sia ĉambro por enlitiĝi. La manĝaĵoj enbuŝiĝas rapide kaj glutigaŝ. Estas la oka horo vespere. La infano iras al la kuirejo por matenmanĝi, li alkuirejiĝas. La infano eksidas sur sia lito kaj forprenas siajn ŝuojn. La infano aŭdas la voĉon de sia patrino, kiu vokas el la kuirejo: venu matenmanĝi. La ŝuoj restas apud la lito. Konsekvence la infano vekigaŝ. La infano enlitiĝas. La infano serĉas per siaj piedoj siajn ŝuojn. Kuŝante en sia lito la infano memoras pri la eventoj de la tuta finiĝanta tago kaj revas pri vojaĝo al nova lando. La infano eksidas en sia lito. La infano songas. La infano ekdormas.

**Jen la solvo.** Estas la oka horo vespere. La infano iras al sia ĉambro por enlitiĝi. La infano eksidas sur sia lito kaj forprenas siajn ŝuojn. La ŝuoj restas apud la lito. La infano enlitiĝas. Kuŝante en sia lito la infano memoras pri la eventoj de la tuta finiĝanta tago kaj revas pri vojaĝo al nova lando. La infano ekdormas. La infano songas. En la sonĝo la eventoj konsistas el pasintaj travivaĵoj. La infano aŭdas la voĉon de sia patrino, kiu vokas el la kuirejo: venu matenmanĝi. Konsekvence la infano vekigaŝ. La infano eksidas en sia lito. La infano serĉas per siaj piedoj siajn ŝuojn. La piedoj enŝuiĝas. La infano iras al la kuirejo por matenmanĝi, li alkuirejiĝas. La manĝaĵoj enbuŝiĝas rapide kaj glutigaŝ.

## Ruĝa lumo, verda lumo

Flandra esperantisto Lode Van de Velde sendis al *Juna Amiko* belan kanton.

Temas pri lia adapto de la kanto *Frat' Jakobo*, kiun li faris por sia 3-jara filineto, denaska parolanto de Esperanto. La originalan kanton en diversaj lingvoj vi povas vidi kaj aŭdi ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Frat%27\\_Jakobo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Frat%27_Jakobo), resp. [https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/ef/Fr%C3%A8re\\_Jacques.ogg](https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/ef/Fr%C3%A8re_Jacques.ogg)





Sooseki Natsume (1867-1916)

# Mi estas kato

Originala titolo en la japana lingvo: *Wagahai wa neko de aru*. Parto el la dua ĉapitro. Tradukita el la franca versio de Mireille Grosjean. Reviziita de Doi Ĉieko, el la japana originalo.

**L**a peco de moĉio<sup>1</sup>, kiun mi vidis hodiaŭ matene, daŭre estas tie, kun la samaj koloroj, gluita funde de la bovlo.

Mi devas konfesi, ke mi ankoraŭ neniam manĝis moĉion. Ĝi aspektas bongusta, tamen ĝi iomete ĝenas min. Mi forprenas per mia antaŭpiedo la legomojn, kiuj kuŝas sur ĝi, kaj mi konstatas, ke miaj piedungoj fariĝas gluemaj post tuŝado de ĝi. Ĝiaodoro similas al tiu de rizaĵo, kiun oni forprenas el la kuirpoto kaj metas en la skatolon por servi ĝin. Mi rigardas ĉirkaŭ mi hezitante, ĉu mi manĝu ĝin. Bonŝance, aŭ eble malbonŝance, neniu venas. La servistino Osan ludas japanstilan badmintonon, dum ŝia vizaĝo aspektas same jarfine kaj ankaŭ printempe. En ĉambro funde de la domo la infanoj kantas „Kion vi diras, kuniklito?”. Estas ĝusta tempo nun aŭ neniam. Se mi lasas tiun ŝancon malaperi, mi devos atendi ĝis la venonta jaro, sen koni la guston de tio, kion oni nomas moĉio. Eĉ estante kato, mi komprenas en tiu momento profundan veron: „Okazo faras aganton”. Fakte mi ne tiom emas manĝi moĉi-supon, kaj eĉ ju pli mi rigardas en la bovlon, des pli tio ĝenas min. Nun tio malplaĉas al mi. Se Osan malfermus la kuirejordon, aŭ mi aŭdus piedsonojn de la infanoj proksimiĝantaj, mi irus for de la bovlo, sen ia bedaŭro, kaj mi ne plu pensus pri la moĉio ĝis venonta jaro. Sed vidu: neniu venas, eĉ se mi malrapide pripensas kaj hezitas, neniu venas. Tamen malgraŭ tio mi sentas, ke io incitas min al provmanĝado. Dum mi observas la internan




parton de la bovlo, mi preĝas, ke iu venu rapide, sed neniu venas. Konsekvence mi devas manĝi moĉi-supon. Finfine, metante mian tutan pezon sur la bovlon same, kiel se mi volus fali en ĝin, mi metas miajn dentojn firme en anguleton de moĉio. Pro la forto, kiun mi uzis por mordi, mi estus devinta fortranĉi ion ajn, sed je mia miro, miaj dentoj restas senmovaj, kiam mi provas retiri ilin. Mi provas mordi pli profunden, sed mi ne plu povas movi miajn makzelojn. Tiam mi ekkonsciis, ke moĉio estas demono, sed jam estas tro malfrue. Same kiel homo falinta en marĉon, enprofundiĝanta ĉiam pli, dum la homo luktas por eliri, ju pli mi mordas, des pli mia buŝo fariĝas peza kaj miaj dentoj enfiksiĝas. Ili estas firme fiksitaj en la moĉio, sed tiu ĉi ne cedas kaj mi povas nenion plu fari. Filozofo Meitei foje komunikis al mia mastro, ke li estas neantaŭvidebla. Tio estis saĝa rimarko. Tiu moĉio estas same neantaŭvidebla kiel mia mastro. Mi povas mordi kaj mordi, tio ne havas finon, same kiel la dividado de dek fare de tri. Mi atingas duan profundan veron en tiu ĉi ĝeno: „Ĉiu animalo kapablas per intuicio senti, ĉu agado estas adekvata aŭ ne.” Mi jam malkovris du verojn, sed la moĉio, kiu enkarcerigas min, gajnas la tutan plezuron. Ĝi kaptas miajn dentojn, kiuj suferegas, same kiel se iu volus forŝiri ilin. Se mi ne rapide sukcesas tranĉi tiun pecon, Osan alvenos, kaj la infanoj, kiuj ŝajne finkantis, certe rapidos kuirejen. Pinte de suferoj mi skuas mian voston ĉiudirekten, mi starigas kaj kuŝigas miajn orelojn, sed ĉio sensukcese. Cetere mia vosto kaj miaj oreloj neniel rilatas al la moĉio kaj mi ĉesas, kiam mi malkovras, ke mi movas ilin sen ia utilo. Iom post iom mi alvenas al



konkludo, ke mi provu forpuŝi la moĉion per miaj antaŭpiedoj, kaj mi komencas per kelkaj frapetoj per mia dekstra antaŭpiedo ĉe mia buŝo, sed la kaptilo, kiu tenas min, ne malfermiĝas pro tia eta ĝeno. En tiu momento mi premas per mia maldekstra antaŭpiedo kaj mi desegnas furiozajn cirklojn per mia kapo, dum mia buŝo estas ĝia centro, sed tiu danco ne sufiĉas por venki la demonon. Poste mi diras al mi mem, ke pacienco endas, kaj mi premas alterne iom dekstre, iom maldekstre; miaj dentoj restas gluitaj en la moĉio. „Sufiĉas!” mi krias kaj mi uzas samtempe miajn du antaŭpiedojn. Kun granda miro mi konstatas, ke mi sukcesas stari sur miaj malantaŭaj piedoj kun neklara impreso, ke mi ne plu estas kato. Tamen tio tute ne gravas en mia nuna situacio; mi tiam firme decidas lukti, ĝis tiu diabla moĉio lasas min, mi gratas mian vizaĝon en ĉiuj direktoj. La furioza agitemo de miaj antaŭaj piedoj fojfoje metas min en malekvilibron, kiun mi devas rekapti per miaj malantaŭaj piedoj, kaj do mi ne povas iuloke stari. Tiel mi trakuras la tutan kuirejon per senordaj salto. Restante modesta mi devas konfesi, ke mi sufiĉe lerte sukcesas stari sur du piedoj. Tria vero subite lumigas min: „Bezono faras iun inventema, tio estas ĉiela beno.” Mi estis elektita por ricevi tiun benon, kaj mi daŭre vikle luktas kun la moĉio, kiam mi ŝajne aŭdas paŝbruan interne de la domo. Kia katastrofo, se iu ekvidas min en tia stato! Mi duoble luktadas saltante tra la kuirejo, kaj paŝoj alproksimiĝas. La dia beno estis al mi transdonita iom tro ŝpareme: infanoj malkovras min.

– Oh! La kato manĝis la moĉi-supon kaj ĝi dancas! Ili krias.

Osan kiel la unua aŭdas ilin kaj post forĵeto de frapilo kaj plumpilko, ŝi envenas fulmotondre tra servista pordo kun fortaj krioj. La mastrino, vestita de silka kimono kun familia emblemo, flustras senrespekte: – Kia malbona kato! Ŝia edzo, eliranta el sia laborĉambro, dediĉas al mi: – Stulta besto!



Nur la infanoj taksas la spektaklon amuza kaj sekve ĉiuj ekridas kune. Mi estas kolera, mi suferas, sed mi ne povas ne salti tien kaj tien. Ŝajnas, ke la ridoj iom ĉesas, kiam la kvinjara filino diras:

– Panjo, same la kato estas ne eltenebla, ĉu ne ?

Kaj la ridoj plu eksplodas, same kiel ŝi revigligis la falantan ardon de la ondoj, kiel oni diras en eleganta lingvaĵo. Mi jam aŭdis pri multaj veraj rakontoj pri la senkompato de la homoj, tamen mi neniam sentis en mi tiom da venĝemo kiel nun. Finfine la dia beno forlasas min komplete kaj mi refalas sur miaj kvar piedoj, malfiere, mizere, povante nur voki helpon per grandaj okuloj. Ŝajnas, ke mia mastro ne volas lasi min morti, kaj li ordonas al Osan forigi el mia buŝo la moĉion. Ŝi alrigardas la mastrinon kun okuloj, el kiuj oni povas kompreni, ke ŝi deziras vidi min danci ankoraŭ iomete. La mastrino ŝatus pli longe vidi spektaklon, tamen ne ĝis mia morto, kaj do konsekvence ŝi diras nenion.

– Baldaŭ ĝi mortos, se oni faras nenion! Liberigu ĝin rapide! – diras mia mastro, turnante sin al la servistino.

Same kiel ŝi eliris el la revo, en kiu ŝi devus forlasi bongustan manĝaĵon, ŝi kaptas la moĉion senplezure kaj tiras ĝin energie. Mi ne estas Kangetsu<sup>2</sup>, sed mi havas la impreson, ke ĉiuj miaj dentoj estas rompiĝantaj. Mi ne eltenas, ke ŝi sen ia mildeco tiras la moĉion, en kiu miaj dentoj firme enradikas, sen ia kompato por la doloroj, kiujn ŝi donas al mi. Kvara vero tiam alvenas al miaj pensoj: „Iu kuraĝigo ĉiam venas post doloroj”. Kiam mi finfine kapablas rigardi ĉirkaŭ mi, ĉiuj jam forlasis la lokon, irinte al aliaj ĉambroj en la domo.

Post la ne tre glora aventuro mi estas ĝenita resti en la domo kaj esti rigardata de Osan kaj de la aliaj. Estas pli bone, ke mi ŝanĝu miajn ideojn; do mi iru malantaŭ la domon por fari viziton al Mikeko, la katino, kiu loĝas ĉe kotoisto<sup>3</sup> laŭ la nova strato.

2) Kangetsu: Mizushima Kangetsu, sciencisto kaj iama lernanto de la mastro. 3) Kotoo: muzikinstrumento.

# Instruistoj revas pri Edinburgo kaj Skotlando

Skotlando estas la loko por la 54-a Kongreso de ILEI, en Edinburgo – bela urbo kun longa movada historio.


Estas tamen malcerte, ĉu la kongreso en julio 2021 povos okazi laŭ la tradicia modelo, kun kongresanoj surloke. Depende de la viruso, la plano B estas refoje okazigi virtualan kongreson.

Skotlando estas norda lando, grava parto de la Unuiĝintaj Reĝlandoj (misnomita en Esperanto kiel Britio). La du plej grandaj urboj ambaŭ troviĝas en la centra valo de Skotlando, ambaŭ apud havenoj kun mara aliro: Glasgovo en la okcidento havas la riveron Clyde kun grava profund-akva haveno kaj Edinburgo en la oriento kun la apuda mar-kanalo Forth. Estas fakte sep grandaj urboj, ekde nun ligata per bonaj trajn-servoj. La aliaj estas Aberdeen (oriente, centro de la Nordmara oleo-industrio), Inverness (plej norde, komencloko por viziti la lagon Loch Ness, kune kun ĝia mita monstro). Pliaj estas Stirling, Perth kaj Dundee. Mia patro naskiĝis en 1915 en Dunfermline, inter Edinburgo kaj Dundee.

La skotoj havas apartan manieron paroli la anglan lingvon, kune kun pluraj specifaj skotaj vortoj, ekzemple bairn (infano), bonny (agrabla), loch (lago), glen (valo), brae (monto-flanko), cairn (ŝtona monumento). Skotlando



La rubrikon prizorgas:  
Stefan MacGill



krome havas keltan lingvon (la gaelan), sed ĝi havas ege malmultajn parolantojn (ĉefe en la fora nordo) kaj estas minacata lingvo. Tio kontrastas kun la irlanda gaela lingvo, kiun ĉ. kvarono de la popolo komprenas kaj eĉ aktive uzas, almenaŭ part-tempe.

Skotlando havas sian propran parlamenton, kiu kunvenas en Edinburgo, kaj ĝi rajtas decidi pri gravaj temoj: edukado, la sanservo, la transporto, la kultura vivo, sian buĝeton kaj multon plian. Praktike nur defendo kaj eksteraj rilatoj restas sub rego de Londono. Skotlando ja voĉdonis por resti en la Eŭropa Unio, dum Anglio kaj Kimrio voĉdonis en la referendumo forlasi la Union. Sekve restas tensioj inter Skotlando kaj Anglio, kaj povos iam okazi refoja referendumo pri la plena sendependeco de Skotlando.

Skotlando havas areon similan al tiu de la Ĉeĥio. Ĝi tie enhavas ĉ. 5 milionojn da personoj, el kiuj preskaŭ triono loĝas en la grandurba areo de Glasgovo. Edinburgo estas hejmo por ĉ. 500,000 personoj. Vidu ĝian mondfaman kastelon en la foto.

**Tradicia:** multjara, laŭ la kulturaj kutimoj.  
**Haveno:** Loko, kie boatoj kaj ŝipoj povas alboridiĝi. **Keltoj:** Frua popolo tra Eŭropo, nun loĝanta ĉefe en Skotlando, Kimrio, Irlando kaj Bretonio. **Minacata:** en danĝero. **Buĝeto:** Financa plano, tipe por la nuna kaj sekva jaroj. **Referendumo:** Demokratia voĉdonado pri difinitaj temoj. **Tensio:** streĉo, maltrankvileco.



## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au*. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at*. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be*. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br*. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk*. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org*; *ilei@espereto.com*. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz*; *cea.polnicky@quick.cz*. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl*. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com*. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com*. **Estonio:** Ahto Siimson; *esperanto.ee*. **Finlando:** Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; *paula.niinikorpi@gmail.com*. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperanto-france@esperanto.org.net*. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de*. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de*. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid; Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, *sandra@esperanto.cat*. **Hungario:** Jozsef Nemeth, Fo u. 41/5, HU-8531 Ihász; *jozefo.nemeth@gmail.com* (por superaj membroj de ILEI); Stefan MacGill; *stefan.macgill@gmail.com* (por simplaj abonoj). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is*. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il*; *esperantisto@live.com*. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *silkovojo@aliceposta.it*. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp*. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr*. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt*. **No-Zelando:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, *ryangomez@xtra.co.nz*. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 Kraków; *mtatara@gmail.com*. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt*. **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Sten Svenonius, *sten@agado.net*. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch\_scheidegger@bluewin.ch*. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com*. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg*. **Usono:** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103; *eusa@esperanto-usa.org*. **Por vidhandikapuloj:** Vjačeslav Suslov; *gloro59@yandex.ru*. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.officejo@gmail.com*.

LERNI LINGVOJN ESTAS UTILE...



Ĉu vi scias, kion signifas «pig» en la angla lingvo?

Ne.

Porko!



Mi nur instruis al vi la anglan!

TRE UTILE...



Ĉu vi scias, kion «pig» en la angla signifas?

...Porko!



...POR ĈIUJ.